

KLEMENTO EL ALEKSANDRIO

LA RIĈULO
kaj
LA SAVO

Enkonduko, traduko kaj notoj
de Armando Zecchin kaj Silvia Garnero

esperanta versio
ueci Torino

Klemento el Aleksandrio

La riĉulo kaj la savo

T...j ŝnĥòmenoj ploÚsioj)
(t...j Ñ ŝnzÕmenoj ploÚsioj)

esperanta versio

UECI-TORINO

Enkonduko

Vivo kaj verkoj de Klemento el Aleksandrio.

Rilate la biografiajn okazaĵojn de Flavio Klemento ni disponas pri informoj necertaj kaj verŝanaj. Li eble naskiĝis en la jaroj 150 p.Kr. en pagana familio, origine atenana kaj kulture helena, li ŝuldas la nomon Aleksandria (el Aleksandrio) al la urbo en kiu li pasigis grandparton de sia vivo, Aleksandrio de Egiptujo. Tien li iris, fakte, junulaĝe, por serĉi scifontojn kaj fariĝis lernanto kaj kunlaboranto de Panteno, difinita de Klemento mem “la abelo sicilia”, kaj poste ties posteulo en la aktiveco de ties katekisma doktrino, la *Didaskaleion*.

La plejparta vivo de Klemento disvolviĝis, do, en la afrika urbo, ni scias tamen ke komence de la tria jarcento li estis devigta forlasi Aleksandriion pro la persekuto rabie incitigita de la imperiestro Aleksandro Severo (202-203) kontraŭ la kristanaro. Tiutempe, eble pro tio, Klemento rifuĝis ĉe Aleksandro, episkopo de Cesareo de Kapadoko, kiu jam estis lia disĉiplo; tie li ricevis la pastecan ordon kaj mortis en 215.

Sendube la persono de Panteno disvolvis gravan rolon en la kristana formado de Klemento: de li fakte, la verkisto ricevis la konon pri la Sanktaj Skriboj. Tamen lia kleriĝo tra helenisma matrico tiom influis ke li konsideras la kristanan tradicion en harmonio kun tiu pagana, eĉ la ideala albordiĝo kaj la natura plenumo de la greka filozofio, konsiderita de Klemento kiel ŝtupo por atingi la veron. La greka kulturo pro-

vizis, do, al Klemento lingvan/kulturan aparaton por legi la Skribojn kun pli komplete filozofia profundeco kaj por ek-prilabori kleran teologion, pro tio ke tiu ĉi konstituis solidan startpunkton por alfronti kiun ajn filozofian kaj teologian demandon elfluantan el la Biblio. Klemento havis tre profundan scion pri la Biblio kaj greka literaturo, precipe pri Platono kaj Homero. En siaj verkoj, Klemento citis 359 ne-kristanajn grekajn aŭtorojn: multaj el ili estas konataj al ni nure pere de Klemento. El la klasika tradicio Klemento ĉerpas aparte la imagon de la Logos, temo ĉeesta en preskaŭ ĉiuj liaj verkoj: de kiuj al ni alvenis, sufiĉe integraj, *Protreptikōj* prōj "Ellenej (Admono al la Grekoj. Pr), *Paidagwōj*, (Instruisto. Ped.), en tri libroj, *Strwmateij* (Diversaĵoj Str.), en ok libroj, kaj, varie titolita, T...j sñxōmenoj ploŭsioj, (Kia riĉulo estos savita. Latine: *Quis dives salvetur*). Krom tiu kvarlogio, estas transdonitaj ankoraŭ du verkoj. Por aliaj pluaj ni posedas nur fragmentojn *Utilas* ilin iomete analizi:

Protreptikōj (Admono. Protr) kiu komencas himnante al Kristo kaj fermas alvokante la Logos¹, eniras la fluojn de la *lōgoi protreptikof*, nome de paroladoj instigaj, kaj estas invito adresita al la paganoj por ke ili sekvu la Logos kaj aliĝu al la kristana kredo.

Paidagwōj (Pedagogo. Ped). La Logos konturiĝas kiel ideala gvido por tiuj kiuj jam elektis la kredon en Kristo kaj estis jam baptitaj: tiu ĉi fakte estas la vera *Paidagwōj* kiu, estante la libro la daŭrigo de *Protreptikōs*, helpas por ke la

¹ Logos (ĉi tie en la greka sono) egalas al Vorto, Vorto de la menso de Dio, do Filo de Dio. Logos ankaŭ signifas Racion disvastigitan en kaj per la homa menso.

animo pliboniĝu, kiel klarigas ilustraj ekzemploj.

Strwmatej, nome “tapetoj” (por kvodlibetaĵoj. Str), diversaĵa verko manka je preciza kaj rigora skemo ĉar la temoj sin sekvas sen logika ligo. Temas pri serio de notoj kaj memorandaĵoj “por la maljunaĝo”: de la rilato inter scienco kaj kredo al kronologia konfronto inter kristanismo kaj la greka filozofio, de la bildo de gnostikulo, nome de la perfekta kristano², kaj alipluaĵoj. Komentistoj trovas en ili spurojn de la platonisma, stoikisma kaj epikurisma filozofioj utiligataj por igi pli komprenata kaj profitdona la bibliaj instruoj, kaj taksas la prozon de Klemento rafinita kaj klara, kvankam enteksita per oftaj resendoj al klasikaj aŭtoroj kaj al Skribaj lokoj; pureco de la formoj atikaj kaj rafinitaj retorikaj iloj de li eluzitaj igas Klementon la plej greka inter la kristanaj verkistoj. Ĉi tie la tradukintoj provis sekvi kiel plej eble la stilon de la verko, foje preskaŭ laŭlitere.

“La riĉulo kaj la savo”. Dum sia loĝado en Aleksandrio Klemento kompilis verkon ĝenerale konitan per la titolo “Quis dives salvetur” laŭ la transdono De Jeronimo; Eŭsebio el Cesareo, male, ĝin konigas per la titolo T...j sñxÒmenoj ploŬsioj. La libro havas karakterizon en la fakto ke ĝi estas la unua kristana traktato temanta pri la riĉo konsiderita en la

² Eble necesas, sed tio ripetiĝos plurfoje laŭnote, ke en la Klementa lingvaĵo tiu termino havas apartan signifon: sciulo, informito, sekvanto de Kristo ktp. Kutime, en aliaj samtempaj verkoj, la sama termino indikas herezon reduktantan Kriston al Eono, al korektanto de la Dia kreaĵo aŭ inspiranto de ekzotika doktrino. Gnozo estas la plej minaca herezo en la historio de Kristanismo, kontraŭ kiu unuanime reagis la Patroj kaj la Ekleziaj Instruaj Instancoj.

problemo de la savo kaj de la kristana moralo.

La traktato, kiu enhavas kelkajn negravajn mankojn, ekas de la evangelia rakonto pri junulo riĉa transdonita de Sinoktikoj kaj citita de Klemento, kvankam kun iuj modifoj kompletige ĉerpitaj el Mateo, per la vortoj Mk 10, 17-31. Verko-instigo estis ĉu la timo eble kaŭzita, en riĉaj aleksandriaj interparolantoj, de la vortoj: “Pli facilas por kamelo iri tra trueton de kudrilo, ol por riĉulo eniri en la regnon de Dio³”, ĉu de la celo de Klemento ne skribi laŭdan paroladon trompe flatanta la riĉulojn, sed samtempe ne malkuraĝigi kaj puŝi al despero tiujn kiuj jam adheris al la kristana kredo. Klemento intencas “trankviligi” la riĉulon: estas savo ankaŭ por li. Konvenas, do, malproksimigi la malesperon (ε̅p̅o̅gn̅ws̅ij), ĉar la simpla fakto de posedo baras al neniu la dian regnon. Duacele, li volas “skui” la riĉulon, metante antaŭ li la moralan responsecon administri kristane la riĉaĵojn.

Per sia ekzegezo, Klemento, kiel klare dedukteblas el titolo T...j s̅n̅x̅o̅menoj ploŬsioj, ke la centra temo ne kerniĝas ĉirkaŭ la ebleco por riĉulo adheri al la kristana religio, sed pri kiaj moralaj kvalitoj kaj vivstilo praktikendaj de riĉulo kiu jam eniris kristanan kredon.

Tiu ĉi traduko elektis, esperante ke ni sukcesis respekti la tekston kaj la celojn de la verko, “La riĉulo kaj la savo”/n, kun la preciza intenco klarigi, ke la signifo de la klementa verko ne nur traktas pri la ebleco por riĉulo sin savi, sed ankaŭ pri la korekta interna sinteno nepra, kaj celata de la evangelio, al posedanto

³ V. Mk 10,25. Eble Klemento rifuzis senprudentan, kaj misportan, interpreton de supraĵaj aŭ fanatikaj kristanoj laŭ kiuj la Sinjoro estis ordoninta al ĉiuj la abstinon de la teraj bonaĵoj.

de riĉaĵoj por atingi la savon.

La kristana pensado de Klemento

Klemento el Aleksandrio estas kutime enkadrigita inter la Patro de la Eklezio, kvankam iam al kelkaj teologoj li aperis iom tro stoikumanta kaj liaj streĉoj kaj klopodoj igi ankaŭ filozofia la kristanan doktrinon sajnus redukti kristanisman al racia eltrovo. Foje, fakte, tie kaj tie lia distingo inter kristano perfekta pro sia kono pri la profundecoj de kristanismo kaj malperfekta kristano pro manko de perfekta kono sajnus alproksimigi lin al la herezo de gnostikuloj pri kiuj ĝenerale savas pli la scio ol la virto. Ankaŭ lia emo alegoriigi la bibliajn eventojn de la Malnova Testamento (ne tamen de la Nova) kontribuis al tia malkonsento. Pri la kredo rilate la Triunuon oni celis rimarkigi ian neklarecon. Tamen liaj insista deklaro akcepti nur tion instruatan de le Eklezio, kaj eksplacita konfeso pri la humaneco kaj dieco de la Verbo elacenticinta, kaj la konstanta invito kongruigi la kristanan sciencon (novan filozofion) vojo al la amo al Dio, hodiaŭ forigas ce kritikistoj dubojn pri lia rajto esti nombrita inter la Patroj de la Eklezio.

Celoj de la verko “La riĉulo kaj la savo”

La *Quis dives* (ci-punkte utilas uzi unufojon la titolon donitan de Jeronimo) estas la unua dokumento kiu pritraktas, rekte kaj vaste, la problemon pri la rilato inter teraj bonaĵoj kaj evangelia anonco. La publiko adresita estis, kiel supre dirite, la kristanaj riĉuloj.

Pri la verko estis elmetitaj diversaj interpretoj, ce en kampo pure ekonomia, kiuj siavice faris Klementon pioniro de ko-

munismo aŭ pledisto de kapitalismo. Ĉe la plejmultaj la penso de Klemento taksigis kiel kompromiso per kiu oni ne plu postulas la rezignon de bonaĵoj, sed nur la korektan uzon je ili. Reale, la kerna temo de la Klementa verko estas la neceso atingi interpreton malpli supraĵan pri la epizodo de la junulo riĉa. En la ĉapitro 5,2 fakte li diras: “Necesas, do, klare scii, por ne interpreti litesence liajn dirojn, sed por malkovri kaj kompreni la signifon kaŝitan en ili per adekvataj esploro kaj interpreto, kion la Savinto al siaj disĉiploj ne instruas laŭ la maniero de homoj, sed kun la saĝo dia kaj mistika”. Ne temas pri interpreto laŭruze kaj supraĵa, sed atenta al la kaŝita signifo de la mesaĝo de Kristo.

La malgajo survenas riĉulon el la nekapablo komplete kompreni la vortojn de Kristo (ĉapitro 20). Laŭ Klemento, Jesuo, fakte, ne preskribus sin senigi je riĉaĵoj, sed disigi la koron el ili. Ne estas, do, la posedo de bonaĵoj la diskrimino por akiri la savon, sed uzo pri ili (ĉapitro 24).

La koncepto ĉirkaŭ kiu fleksebliĝas la tuta verko estas la pasioj interligitaj kun la riĉo, pli ol la riĉo mem: povas sin savi riĉulo kiu ne sklaviĝus de siaj posedaĵoj, same kiel povas sin damni malriĉulo kiu sklaviĝus de ili. Do, tiam soviĝis malfido pri tio ĉe nekristanoj kaj eble kontrasto inter kristanoj.

La interpreto “mistika” pri la evangelia ero taŭgas kun la lernejo Didaskaleion, kiun li kontribuis, fakte, fondi kaj disvastigi: skolo de la “spirita, mistika, simbola” interpreto de la Biblio malsame ol la skolo de Antiokio kiu preferas insisti sur la litera aŭ historia valoro de la Biblio. La du skoloj - ĉi-kaze – konsentas ke Kristo sugestis ankaŭ la kompletan senvestiĝon

je bonaĵoj, sed en libera akcepto de la invito de Kristo kiel amo sindediĉa al la Patro kaj la homoj bezonantaj je la Krista mesaĝo.

Kiel la teksto alvenis ĝis nin.

La teksto de *Quis dives* (Kia riĉulo) transdoniĝis tra unusola pergamena kodekso, la tieldirita *Scorialensis*, datigita je XII jarcento en unusola kopio, el kiu estis kopiita la *Vaticanus Graecus* 623, papera, dum laXVI jarcento.

Ambaŭ kopioj havas kelkajn vortajn aŭ frazajn mankojn kaj ne signas la titolon. La latina titolo estas eltirita el la memoroj de Jeronimo, la greka el la historio de Eŭsebio.

Armando Zecchin kaj Silvia Garnero^{3a}

^{3a} Armando Zecchin profesoris pri la greka kaj la latina kaj praktikis esperanton per diversaj verkoj tradukaj kaj originalaj. Garnero Silvia, doktoriĝis pri fremdaj lingvoj (Franca kaj Angla) ĉe la Torina Universitato en 1974, poste, en 1988; ĉe la sama universitato ŝi doktoriĝis pri la Itala. En

2004 ŝi akiris la triagradan magxistriĝan diplomon de la Itala Instituto de Esperanto, kaj en tiu ĉi lasta lingvo ŝi verkas kaj instruas pere de komputilo en la kurso Kirek de IEJ kaj en aliaj tiaspecaj kursoj.

La riĉulo kaj la savo

La evangelio naskas en la riĉaj kredantoj malkvietiĝon kaj senesperon koncerne la savon

1,1. Kiuj disdonas laŭdajn paroladojn al la riĉuloj laŭ mi devus esti taksataj ne nur flatantoj kaj malnoblaj⁴, ĉar ŝajnigas prezenti valoraj aĵojn kiuj pro tio tute ne brilas, sed ankaŭ malpiaj kaj insidemaj. **2.** Malpiaj, ĉar neglektante laŭdi la solan perfektan kaj bonan⁵ Dio-n, “el kiu devenas ĉiuj aĵoj kaj pere de kiu ekzistas ĉiuj aĵoj kaj al kiu anhelas ĉiuj aĵoj”⁶, ĉar atribuas tiun kvaliton “dian” al homoj kiuj ruliĝas en “korupton kaj koton”⁷, afero kiu konstituas la precipan objekton de la dia juĝo; **3.** krome insidemaj ĉar, kvankam el si mem la riĉo taŭgas orgojligi la animojn de tiuj kiuj ĝin posedas kaj ilin korupti kaj forigi el la vojo, tra kiu eblas gajni la savon, konfuzas iliajn mensojn ilin ŝveligante per la flato de senmezuraj laŭdoj kaj ilin inklinigante malsŝati ĉion veran krom la riĉon, pro kiu ili estas admirataj. Laŭ proverbo⁸, ili ĵetas fajron sur fajron, akumuligas orgojlon sur orgojlon kaj pligrandigas la

⁴ La tipo de homo servila kaj flatanta kiu sin helpas per sagacaj paroladoj por akiri personajn avantaĝojn havas matricon klasikan, aparte en Platono.

⁵ La senco de tiuj vortoj estas sama kiel de Mt 5,48 kaj 1921; Mk 10,18; Lk 18,19.

⁶ V. Rm 11,36.

⁷ Senco intuiiigita el komparo kun samaŭtoraj verkoj (V. Pro. 56,3).

⁸ La samo troviĝas en aliaj samaŭtoraj verkoj.

pezon de la riĉo, balasto tre oprima sur naturo jam subpremata, el kiu male necesus forpreni kaj tranĉi, same kiel el malsano danĝera kaj mortiga: fakte por orgojliĝanto kaj grandiganto estas pretaj, kiel reago, ŝanĝo⁹ kaj falo direktigantaj al kondiĉo mizera, laŭ la instruo de la dia vorto¹⁰. **4.** Al mi, male, ŝajnas esti signo de pli granda amo ol servi... tiujn kiuj riĉiĝas...je sia damaĝo... ilin levi... al ilia savo... laŭ plejeblo¹¹, je unu flanko tiun petante de Dio kiu certe kaj malavare koncedas al siaj filoj tiaĵojn, je alia flanko prizorgante iliajn animojn per paroladoj poraj al la sava graco, ilin luminante kaj gvidante al posedo de la vero: nur kiu ĝin trafas kaj sin iluminas per bonagadoj ricevos la premion¹² de la eterna savo. **5.** Estas bezonata preĝo de animo forta kaj persista ĝis la lasta vivotago al ĝi kongruigita, kaj interna¹³ dispozicio bona kaj konstanta kiu etendiĝu al ĉiuj ordonoj de la Savanto.

2,1. Povas rezulti nefacile, eĉ multpene, malkovri pri kia kialo ŝajnas pli malfacila por riĉuloj ol por malriĉuloj la savo. **2.** Kelkaj, fakte, aŭdinte senperece kaj supraĵe la Sinjoran vorton, laŭ kiu “pli facile kamelo kudrilan trairas trueton, ol por

⁹ Komentariistoj vidas en la esprimo katabol” ”ŝanĝo, modifiĝo” imiton de la lingvaĵo de Tucido.

¹⁰ Estas certe aludataj Mt 23,12; Lk 14,11; 18,14.

¹¹ Ankaŭ tie ĉi la teksto estas mankoplena, sed la signifo entute klaras: Klemento, fakte, ne ariĝas al la roto da laŭdantoj de riĉo kaj esprimas riĉulojn amon pli grandan ĉar, male, anstataŭ sin meti je ilia servo, li volas indiki al ili la veran bonon.

¹² V. Fil 3,13.

¹³ La vorto difthsij, “intima inklino”, origine estas taksata derivaĵo platona.

riĉulo eniri la ĉielen regnon¹⁴”, malesperante¹⁵ pri si kaj sia vivo, tute sin forlasas al la mondo¹⁶. Alkroĉiĝinte al la ĉi-tiea vivo opiniata la sola por ili restanta, ili malproksimiĝas ĉiam pli el la ĉiela vivo kaj ne strebas kompreni nek pri kiaj riĉuloj la Sinjoro kaj Majstro parolas nek kiel kio ne eblas inter la homoj povas fariĝi ebla¹⁷. **3.** Aliaj, male, komprenis korekte kaj laŭvere, sed subtaksis la agojn kiuj kondukas al la savo kaj ne faris la preparojn bezonajn por atingi kion ili esperis. **4.** Tial mi intencas anonce priskribi tiujn du malsamajn eblecojn koncerne la riĉulojn kiuj jam spertis la potencon de la Savanto kaj ties konstatitan savon; koncerne tiujn kiuj ne jam estis incitaj al la vero, pri ili ĉi tie mi ne zorgas¹⁸.

3,1. Tial, kiuj amas la veron kaj la frataron..., arogante ne akriĝu kontraŭ la riĉuloj alvokataj al la kredo, nek flate kliniĝu antaŭ ili pro sia espero profiti, sed unuacele por ilin liberigi, per la parolo, el la vakua¹⁹ malespero kaj montri, per la deviga interpreto de la diroj de la Sinjoro, pro kiu kialo por ili

¹⁴ Mk 10,25; Mt 19,24; Lk 18,25.

¹⁵ Evidentas ke Klemento en tiu pasaĝo, komunikas sian penson ne, sendistinge, al la riĉularo por ke ili konvertiĝu, sed al riĉuloj jam kristane iniciatitaj.

¹⁶ Ĉi tie *vivo* signifas la “eternan vivon”, nome la savo fina, kaj *mondo* aludas la laŭhoman mondon, nome al la foreco el Dio.

¹⁷ Mk 10,27; Mat 19,26; Lk 18,25.

¹⁸ Evidentas ke Klemento adresas sian parolon ne, senspecife, al riĉuloj por ke ili povu konvertiĝi; sed, kiel jam substrekite en la enkonduko, al la riĉuloj jam incitaj kaj akceptintaj la videblan savon per la bapto. Pliposte tiujn riĉulojn Klemento difinas “alvokataj”.

¹⁹ Alia traduko, el alia varianto (ken”n, vakua, anstataŭ kain”n = nova). La unua proponas signofon pli klaran.

ne estas definitive ellasita la posedo de la ĉiela regno se ili o-beos Liajn ordonojn. **2.** Poste, kiam la riĉuloj ekscios ke mem sentas senmotivan timon kaj ke, se mem volas, la Sinjoro ilin ĝoje akceptas, tiam nececas ilin instrui kaj iniciati, por ke ili komprenu per kiaj verkoj kaj kia anima dispozicio eblas atingi kion ili esperas, ĉar tio por ili nek senas je malfacilaĵoj, nek, male, realĝas hazarde. **3.** Sed ulo, el la mondo taksata riĉa, opiniu ke liaj aferoj similas tiujn de atletoj²⁰, se licas kompari realojn etajn kaj efemerajn kun grandaj kaj nekorupteblaj. **4.** Inter la atletoj, fakte, iu, neesperantante venki la kronon, eĉ ne enskribiĝis al konkurso; alia, male, kiu en sia menso nutris la esperon, sed ne konstantis en la klopodoj, ekzercoj kaj nutrado taŭga por atingi la celon, restis senkrona kaj fiaskigis siajn esperojn. **5.** Tiel ke neniu, eĉ se ĉirkaŭita de aĵoj de ĉi tiu tero, ekde komence senkreditiĝu pri la posedo de la premioj de la Sinjoro, sed fidu kaj kapablu vidi la grandon de la amo de Dio al la homo; tamen samulo ne esperu povi akiri la kronojn de nekorupteco se li rezignas trejnadon kaj konkuron rifuzante penon kaj ŝviton. **6.** Male, li sin konfidu al la Verbo kiel al trejnanto kaj al Kristo kiel al konkurjuĝisto. Nutraĵo kaj trinkaĵo preskribitaj estu la nova interligo²¹, gimnastikaj ekzercoj la ordonoj²², honoro kaj ornamo la bonaj dispozicioj de la animo: amo, fido, espero²³, kono de la vero, ... mildeco, mizerikordo, sankteco, por ke,

²⁰ Klemento uzas la imagon, kiel jam sankta Paŭlo, de la konkurso kaj stadiono (ekzemple, 1Kor 8,24), sed ĝenerale ankaŭ la greka kulturo, el kiu la konkursema spirito, sin helpas per atletecaj komparoj.

²¹ 1Kor 11,25ss.

²² Koncepto ĉeesta ankaŭ en aliaj samaŭtoraj verkoj.

²³ V. 1Kor 13,13; 1Kor 15,52.

kiam la lasta trumpeto startigos la konkuron por eliri el tie ĉi kiel el la stadiono de l' vivo, li povu stari kun bona konscienco antaŭ konkurojuĝisto²⁴, rekonata inda je la ĉiela patrujo, kiun eniras kronite kaj de anĝeloj aklamite.

4,1. La Savanto do koncedu al ni ekpritraktantaj doni al fratoj enhavojn laŭverajn kaj koncernajn kaj profitdonajn, unuacele por esperi savon kaj duacele por ĝin atingi. **2.** Li liveras donacojn al lin preĝantoj kaj instruas lin demandantojn kaj dissolvas nescion kaj forigas desperon, kaj ripetas, rilate riĉulojn, la samajn vortojn kiuj jam sin prezentas kiel klaraj interpretoj kaj gvidoj de propra vivo **3.** Neniu fakte pli efikas ol aŭskulti tiujn dirojn kiuj el la evangelioj ĝis nun nin ĝenis ĉar ni ilin aŭskultis sen la ĝusta konsidero kaj laŭ sensperta maniero, kiel infanoj.

La parabolo de la junulo riĉa²⁵.

4. “Kaj dum li foriris sur la vojo, unu homo kuris al li kaj ekgenuis antaŭ li, kaj demandis lin: “Bona Majstro, kion mi faru, por ke mi heredu la eternan vivon?”. **5.** Kaj Jesuo diris al li: “Kial vi nomas min bona? Neniu estas bona krom Unu, nome Dio. Vi scias la ordonojn: Ne mortigu; Ne adultu; Ne ŝtelu; Ne parolu malveran ateston; Ne rabu; Respektu vian patron kaj vian patrinon”. **6.** Kaj li responde diris al li: “Majstro, ĉion tion mi observis ekde de mia juneco”. Kaj Jesuo, rigardante lin, amis lin, kaj diris al li: “Unu mankon vi havas; iru, kaj

²⁴ Imago kutima ankaŭ en ceteraj liaj verkoj.

²⁵ Estas raportata la versigo de Mk 10,17. Oni povas noti ke Klemento miksas tiun tekston kun tiu de Mt 19,16 kaj ĝin iom modifas por igi ĉion pli taŭga al sia celo, nome influi la legantojn.

venu ĉion, kion vi havas, kaj donu al malriĉuloj, kaj vi havos trezoron en la ĉielo; kaj venu, sekvu min”. **7.** Sed li malgajiĝis ĉe tiu parolo, kaj foriris malĝoja: ĉar li havis multajn posedaĵojn kaj kampojn. **8.** Jesuo, ĉirkaŭrigardante, diris al siaj disĉiploj: “Kiel malfacile tiuj kiuj havas riĉon, eniros en la regnon de Dio! “. La disĉiploj ege miris pro tiuj vortoj. **9.** Sed Jesuo denove aldonis: “Infanoj, kiel malfacilas por tiuj kiuj konfidas en riĉoj eniri la regnon de Dio; pli facilas por kamelo eniri kudriltruon ol riĉulo la regnon de Dio²⁶“. Ili malkvietiĝis eĉ pli kaj diris: “Kiu tial povu sin savi?”. Sed Li, ilin rigardante, diris: “Kio ne eblas por la homoj, tio eblas ĉe Dio”. **10.** “Petro ekparolis al li: “Jen ĉion ni forlasis kaj sekvis vin”. Jesuo respondis: “Vere mi diras al vi: kiu forlasis siajn havaĵojn kaj gepatrojn kaj gefratojn kaj posedaĵojn pro mi kaj pro la evangelio, riĉevos centoble²⁷. Do, en tiu ĉi tempo, kiucele posedi kampojn kaj posedaĵojn kaj domojn kaj gefraton kune kun persekutado²⁸? En la estonto estas la eterna vivo. La unuaj estos la lastaj kaj la lastaj la unuaj”.

5,1. Tio estas skribita en la evangelio laŭ Marko, kaj en ĉiuj aliaj evangelioj, tiaj rekonitaj, eble malmulto estas aliigita de tiuj vortoj en ĉiu ero, male ĉio montras pensan akor-

²⁶ En manuskriptaj tekstoj troviĝas, foje, anstataŭ ĉfemeloj (kamelo) ankaŭ ĉfmloj (ŝipŝnurego), eble enŝtelita por mildigi la komparan kontraston: pli facilas tion fari por ŝnuro ol por kamelo.

²⁷ La fakto ke Jesuo promesas centoblon de la forlasitaĵo signifas ke, interalie, ankaŭ la materia bonstato estos redonita en la eterna vivo. Jesuo, do, ne disdegnas la riĉon konsideratan kiel bonaĵon.

²⁸ La aldoniĝo “kune kun persekutoj”, propra de Marko, sugestas ke teraj gratifikaĵoj, eĉ se tre kontentigaj, neniam estas disdividitaj el suferoj.

don²⁹. **2.** Necesas, do, klare scii, por ne interpreti litersece liajn dirojn, sed por malkovri kaj kompreni la signifon kaŝitan en ili per adekvataj esploro kaj interpreto, kion la Savanto al siaj disĉiploj ne instruas laŭ la maniero de homoj, sed kun la saĝo dia kaj mistika³⁰. **3.** Kaj fakte, inter la asertoj formulitaj enigmaniere ankaŭ tiuj kiuj ŝajnas esti eksplikitaj de la Sinjoro mem al siaj disĉiploj bezonas ne malpli grandan atenton, male eĉ pli grandan pro la superabundo da enhava penso. **4.** Kaj se la intruaĵojn, kiujn oni opinias liveritajn de Li mem al tiuj kiuj eksterregne foras kaj al tiuj kiuj estas nomataj filoj de la regno³¹ postulas pluan komprenstrebon, certe tiuj enhavoj liveritaj kun simpla tia ke ili ne ekscitis demandojn ĉe la aŭskultantaro, portantaj al plenumo de la savo kaj trapenetritaj je admirinda kaj plena pensprofundo, devas esti esplorataj kun ne supraĵa atento, sed kun la menso direktita al la intima ideo kaj al la ena penso de la Sinjoro.

Riĉo ne estas malbono por la interne liberiĝintoj

6.1. Kun ĝojo nia Sinjoro kaj Savanto sin lasis enketi rilate demandon ege gravan, kiel Vivo rilate vivon, kiel Savanto rilate savon, kiel Majstro rilate la temon esenca inter la instruoj de Li disdonitaj, kiel Vero rilate senmortecon, kiel Vorto rilate la vorton de la Patro, kiel Perfektulo rilate la perfektan ripozon, kiel Nekoruptulo rilate la certan nekoruptecon. **2.** Li sin lasis pridemandi ankaŭ rilate tiujn realaĵojn pro kiuj Li

²⁹ Tio dedukteblas el la samrakontaj eroj de Mt 19,16-30 kaj Lk 18,18-30.

³⁰ Klemento, kiel jam dirite, proponas sian spiritan interpreto-manieron pri la Sanktaj Skriboj, kiu ne haltu ĉe la materia valoro de la vorto.

³¹ V. Mt 13,38.

venis surteren kaj al kiuj Li nin edukas, realaĵoj kiujn instruas, kiujn liveras, por indiki la fundamenton de sia bonanonco, nome la komunikado de la eterna vivo. **3.** Kaj, ĉar estante Dio, li antaŭscias ĉu kion pri kio li estos demandita ĉu kion ĉiu respondos. Kiu ajn tiaĵon povus scii pli ol la plej perfekta el la profetoj kaj ol la Sinjoro de ĉiu profetanta spirito? **4.** Difinita bona, Li startas el tiu esprimo mem, el kiu ekas ankaŭ Lia instruado, direktigante la disĉiplon al Dio bona, unua kaj sola disdonanto³² de eterna vivo, kiun la Filo donas ĉar jam de li ricevitajn³³.

7,1. Ekde la komenco oni devas fiksi en sia animo la plej gravan kaj precipan inter la instruadoj kondukantaj al la vivo: koni la eternan diaĵon, kiu disdonas eternajn bonaĵojn, la unuan, superan solan Dion bonan. Kaj eblas ĝin posedi per la kono³⁴ kaj kompreno. **2.** Tio estas la principo senŝanĝa kaj fiksa kaj la fonto de vivo, nome la kono pri Dio, pri Tiu kiu vere estas kaj kiu donas la aĵojn daŭrigantajn, pliprecize tiujn eternajn, kaj el kiu ankaŭ por la aliaj estaĵoj procedas la esto kune kun la ekzisto. **3.** Fakte ignori Dion similas morton, dum

³² La imago pri diaĵo tam...aj, nome “trezoristo, disdonanto”, klasike figuras.

³³ V. Joh 14,16.

³⁴ Ĉi tie Klemento uzas gnŝisj kun signifo nova: kutime la Patroj per tiu nomo indikas herezon renversantan ĉion kristanan. Por Klemento “gnozo” estas la ĝusta laŭracia sistemo interpreti la bibliajn esprimojn kaj per ĝi alveni al kompreno pri la realoj teologiaj. Koni kiel asimiliĝi al Dio estas imago ĉeesta ankaŭ ĉu en la Johana evangelio (17,3) ĉu en la klasika literaturo (Platono) kaj fariĝos filozofia-mistika spekulativo ĉe estontaj kristanaj teologoj kaj filozofoj

la scio pri Li, familiareco, amo kaj asimiliĝo al Li estas la sola vivo.

8,1. Tial al tiu kiu volas vivi la veran³⁵ vivon estas rekomendite koni unue kiun “neniu konas krom la Filo kaj tiu al kiu la Filo volus malkaŝi³⁶”, poste ellerni la specialecon de la Savinto kaj la novecon de la graco, ĉar laŭ la apostolo “la leĝo estis donita per Moseo; la graco kaj la vero estiĝis per Jesuo Kristo³⁷”. Kaj la donacoj kiuj estas liveritaj pere de fidela servisto ne estas egalaj al tiuj kiuj estas liveritaj pere de laŭleĝa filo. **2.** Se do la mosea leĝo³⁸ estintus kapabla doni la eternan vivon, senkiale la Savinto venintus kaj suferintus pro ni tra kurante la homan staton ek de la naskiĝo ĝis la morto sur kruco³⁹, kaj vane tiu kiu jam plemunis ĉiujn leĝajn preskribojn “ekde la juneco⁴⁰” genue aliulon petintus la senmortecon. **3.** Fakte ne nur tiu plenumis la leĝon, sed ankaŭ komencis tuj, de la juneco! Alikaze kio granda streĉus maljunecon luman kaj senan je tiuj kulpoj generitaj el junecaj deziroj kiaj boliĝo de kolero aŭ amo al riĉecoj? Sed se ulo en junula impeto kaj en aĝaj ardoj montras sintenon maturan kaj pli indan en maljunulo ol en sia aĝo, temas pri luktanto admira kaj laŭdinda kaj jam matura en lia menso⁴¹. **4.** Sed, tamen, tiu ulo estas absolute konvinkita ke rilate justecon al

³⁵ V. !Tim 6,19.

³⁶ V. Mt 10,37.

³⁷ V. Joh 1,17; Heb 3,5ss.

³⁸ V. Gal 2,21.

³⁹ V. Fil 2,8. El la greka teksto shme...on (signo) kiu en la vivo de Kristo estas precipe la morto sur la kruco.

⁴⁰ V. Mk 10,20.

li nenio mankas; vere la vivo, al li, mankas komplete; ĝuste pro tio li ĝin petas al la sola kiu ĝin povas doni; li sin sentas fidema rilate la leĝon, sed propetas la Difilon. **5.** Li pasas de “kredo al kredo^{42c}”, flosante, kiel ŝipo, malsekure en la leĝo kaj endanĝere en navigo, li iras albordiĝi ĉe la Sinjoron.

9,1. Do Jesuo lin ne riproĉas pro malplenumo de ĉiuj leĝaj preskriboj⁴³, sed lin amas kaj elkore aprobas pro fideleco montrata en la observado de aferoj ellernitaj, sed diras ke li ne perfektas ĉar li plenumis neperfektaĵojn rilate la eternan vivon, montriĝante unuflanke fervora zorganto pri la leĝo, aliflanke pigra plenumanto de la vera vivo. **2.** Tial estas aferoj belaj ankaŭ tiuj (kiu aŭdacus tion malkonsenti? Fakte “sanktas la ordono^{44c}”) kiuj plenumas pedagogan agadon pere de timo kaj enkonduka edukado al la respekto de la supera Jesua leĝo kaj graco⁴⁵; sed la plenumo de la “leĝo estas Kristo por ĉiu kredanto celanta al laŭjusta vivo”, tiu kiu estante servisto ne servistigas, sed igas filoj kaj heredantoj la plenumatojn de la volo de la patro⁴⁶.

⁴¹ La temo de *puer senex* (infano maljuna) estas “toposo” kiu ĝuos je ampleksa sukceso en eŭropa literaturo: en tiu figuro de ideala homo, junulo, pro sia virta konduto, montras maturiĝon laŭdindan en maljunula aĝo, kaj tiel la du polusoj - junaĝo kaj maljunaĝo - emas al kompensado.

⁴² V. Rm 1,17 kaj Strom. IV,29,3.

⁴³ V. Str IV 29,3.

⁴⁴ V. Rm 7,12.

⁴⁵ V. Gal 3,24.

⁴⁶ V. Rm 8,14-17; Mt 12,50.

10,1. “Se vi volas esti perfekta^{47c}. Li, do, ne estis jam perfekta: nenio fakte estas pli perfekta ol la Perfektulo. Kaj la “se vi volas” die rivelis la memdecidan fakulton de la animo konversacianta kun li. Fakte de la homo dependas la elekto ĉar libera, el Dio la eblo doni ĉar Sinjoro. **2.** Li donas al tiuj kiuj volas kaj engaĝiĝas kaj petas, por ke la savo rezultu bono al ili propra. Dio, fakte, perfortas nenium, ĉar perforto estas al li malamika, sed al serĉantoj Li liveras kaj al petantoj Li donas kaj al frapantoj Li malfermas⁴⁸. **3.** Se vi volas, do, se vi vere volas kaj ne trompas vin mem, havigu al vi tion kio al vi mankas. “Unu mankon vi havas^{49c}: la sola, tiu koncernanta min, la bonon, kiu superas la leĝon, kiun la leĝo ne provizas, kiun la leĝo ne entenas, kiu estas propra al la vivantoj. **4.** Tiu kiu plenumis ĉiujn leĝajn preskribojn, “dejunece^{50c}, kaj brustoŝvelemas, ne povis al ĉio tio aldoni tian solan aĵon, elekti la Savanton por akiri la eternan vivon tiom deziritan: plue, li defiliĝas ĉagrenita, malkvietigita pro invito al vivo, pro kies akiro jam li propetis. **5.** Reale li ne volis vere la vivon, kiel li diris, sed nur gajegis pri la famo de bona volo kaj fakte koncerne multajojn li kondutas fervore, sed koncerne unusolan celindaĵon, la agadon de l’vivo, li estis nekapabla kaj sena je deziro kaj energio por ĝin plenumi. **6.** Ion similan la Savinto diris ankaŭ al Marta kiu estis engaĝplena pro multajoj kaj streĉis kaj makvietiĝis tra farindaĵoj kaj riproĉis, male, sian fratinon kiu jam neglektis la samajn farindaĵojn kaj sidantis

⁴⁷ Mt 19,21.

⁴⁸ V. Mt 7,7; Lk 11,9.

⁴⁹ V. Mk 10,21; Lk 18,22.

⁵⁰ V. Mk 10,20.

ĉe Liaj piedoj, elspezante la tempon por ellerni: “Vi malkvie-
tiĝas pro multajoj, Maria male elektis la parton plejbonan kaj
pri ĝi ŝi ne estos senigita⁵¹”. **7.** Tiel Kristo instigis ankaŭ tiun
ulon forlasi sian egan faradon kaj sin dediĉi kaj priprofundiĝi
en unu solan aferon, nome la dono de tiu kiu liveras la eter-
nan vivon.

11,1. Sed kio, do, lin jam igis forfuĝanta kaj dizertulo de
la Sinjora dono, de la preĝo, de la espero, de la vivo, de la pe-
noj iam alfrontitaj? **2.** “Vendu kion vi havas⁵²”. Kion signifas
tio? Ne okazas, kiel iuj komentas supraĵe, ke Li ordonu forĵe-
ti sian havaĵaron kaj rezigni riĉecon, sed reĵeti el la animo la
pensojn rilate riĉaĵojn, la kaptemon rilate ilin, la ekscesan
deziron pri ili, la malsanan deziregon pri ili, la penojn kaj
dornojn de vivo kiu sufokas la semon de l’vivo. **3.** Ne estas
granda kaj enviinda afero esti abrupte senigita je la havaĵoj se
ne pro la vorto vivdona (alikaze absolute nenionhavantoj, sed
estas forlasitaj kaj mankantaj je ĉiutaga bezonataĵo, la almoz-
petantoj puŝitaj laŭstraten, “kiuj ne konas” Dion kaj “la jus-
ton de Dio⁵³”, pro tio esti komplete en malriĉeco kaj manki je
vivrimedojn kaj malabundi je la plej etaj vivigaĵoj, estus la

⁵¹ Lk 10, 38-42. La interpreto kiun faras Klemento pri tiu Luka evange-
liero pri Marta kaj Maria ne similas al tiu kiu plej disvastiĝis de la tempo
de Origeno: Marta estus la simbolo de la aktiva vivo kaj Maria de tiu
kontempla. Ĉi tie, male, fronte al figuro de riĉulo kiu ne sukcesas transiri
la simplan respekton pri la leĝo, Marta prezentas la mosean leĝon kun
ties literaj preskriboj, Maria la leĝon de la spirito kies kerno estas la amo al
Dio kaj al la proksimularo.

⁵² V. Mt 19,21; Mk 10,21.

⁵³ V. Rm 10,3.

plej feliĉaj kaj karegaj al Dio kaj la solaj posedontoj de la eterna vivo). **4.** Kaj ne okazas ke estu evento tute nova rezigni riĉon kaj ĝin disdoni al malriĉuloj aŭ al la patrujo, samkiel jam faris multaj eĉ antaŭ la alveno de la Savanto, iuj pro koho kun skolaj instruoj kaj morta saĝo, aliaj pro vana famo kaj vanto, nome Anasagoro, Demokrito, Krateto⁵⁴.

12,1. Kion do anoncas la Sinjoro kiel novaĵon kaj ekskluzivaĵon de Dio, la solan kapablan doni la vivon, sed nekapablan savi la homojn vivintajn antaŭ Kristo? Kaj do “se la nova kreaĵo⁵⁵”, nome la Difilo, anoncas kaj instruas ion nur propran, Li ne rekomendas kaj instruas ion nuraperan kaj jam praktikitan de aliaj, sed ion specifan evidentigitan eĉ aspekte kiel la plej grandan kaj eldian kaj perfektan: senvesti la animajn inklinojn el la pasioj tie kaŝitaj, kaj deaki kaj forĵeti la aĉaĵojn fremdajn⁵⁶ al la ena penso. Tia estas, fakte, kion la kredanto devas ellerni, kaj la instuo inda je la Savanto. **2.** La homoj vivintaj antaŭ Kristo, fakte, malŝatinte la eksterajn realaĵojn, disdonis aŭ vendis siajn havaĵojn, sed la pasiojn de la animo mi kredas ke ili pliigis: ili fakte vivis orgojle kaj arogantece kaj vante kaj malŝatante ceterajn homojn, opiniante esti plenumintaj ion superhoman. **3.** Kiel, do, la Savanto povintus laŭdi, antaŭ tiuj kiuj vivos por ĉiam, elektojn kiuj ilin damaĝintus kaj riunigintus ĝuste rilate la vivon kiun Li estas anoncanta? **4.** Kaj fakte eblas ankaŭ ke, post tia malpeziĝo je siaj

⁵⁴ En la klasika literaturo tiuj personoj, kune kun multaj aliaj, estis cititaj kiel reprezentantoj de ateismo.

⁵⁵ V. Kol 1,15; 2Kor 5,17; Gal 6,15.

⁵⁶ La esprimo ti ĉi havas originon el stoikismo kaj indikas la aĵojn eksterajn opone distingiĝantaj el tio kio estas interne de la homo.

havaĵoj, spite de tio oni povas senti nebremseble kaj laŭnature deziron kaj avidon pri riĉaĵoj; aŭ iu povas forĵetinti la havaĵojn, sed nun estante sena kaj samtempe deziranta pri la foritaĵoj, ĉaĝreniĝi pro du kialoj, ĉu pro manko je tio bezonata kaj ĉu pro bedaŭro pri la antaŭa decido. **5.** Fakte maleblas aŭ vere malfacilas, ke tiu kiu senhavas, rilate vivbezonaĵojn, ne sentas ankaŭ deprimon en la animo kaj malzorgemon pri la superaj valoroj, provante male ĉiumaniere kaj ĉiuruze sin provizi je bezonaĵoj.

13,1. Kaj kiom, kompreneble, estus pli utila la malo, nome posedi sufiĉajn bonaĵojn, tiel ke oni ne suferu kaj helpu al tiuj al kiuj konvenas helpi! Fakte kiel eblas kunpartigi inter honoj se neniu posedas ion? **2.** Kaj kiel tia pensmaniero ne kontraŭstarus kaj ne konfliktus aliajn pensojn de la Sinjoro? **3.** “Faru al vi amikojn per la mamono⁵⁷ de maljusteco, por ke, kiam ĝi mankos, oni akceptu vin en la eternaj loĝejoj⁵⁸”. “Provizu al vi trezorojn en la ĉielo kie nek ti-eno nek rusto korodas nek ŝtelistoj ŝtelas⁵⁹”. **4.** Kiel oni povus doni manĝaĵon al malsatantoj kaj trinkaĵon al soifantoj kaj vesti senvestulon kaj gastigi senhejmulon⁶⁰ - kaj al tiu kiu tion ne faras Kristo minacas fajron kaj eksteran mallu-

⁵⁷ La vorto *mammon* (mamwn©) indikas la riĉaĵojn kaj estis konservita ĉe la evangeliistoj en la origina formo. Ĝi estis jam uzita en Sir 31,8 por malŝatigi la kananajn idolojn al kiuj tiutempaj hebreoj oferis. Ĝi komprenigas riĉaĵojn de kiuj la homo estas posedata.

⁵⁸ V. Lk 16,9.

⁵⁹ V. Mt 16,20.

⁶⁰ V. 25,35-46.

mon⁶¹ - se ĉiu sin trovas sen io ajn el tiuj aĵoj? **5.** Sed Kristo estas gastigita de Zakĥeo⁶², de Levi⁶³, de Mateo⁶⁴, riĉaj kaj publikanaj (impotistoj), kaj ilin Li ne instigas ĵeti foren riĉaĵojn, sed pri ili preskribas uzon korektan kaj eliminigas tiun nekorektan, kaj anoncas: “hodiaŭ la savo eniris tiun ĉi domon⁶⁵”. **6.** Tiel li laŭdas la uzon kiun oni faras je ili, kaj instigas al la kunpartigo, aldonante la devon doni trinkaĵon al la soifanto, panon al malsatanto, ricevi senhejmanton, vesti senvestulon. Se ne eblas plenumi tiujn utilajn agaĵojn prenante el riĉaĵoj kaj, male, la Sinjoro instigus sin liberigi je ili, kion alio li farus se ne instigi doni kaj nedoni samaĵojn, doni kaj ne doni manĝaĵojn, gastigi kaj ne gastigi, kunpartigi kaj ne kunpartigi? Tio estus la plej mallogika sugesto!

14,1. Tial, ne forĵetindas la riĉaĵoj kiuj povas utili al la proksimularo car ili estas posedaĵoj kiam ili estas posedaj kaj avantaĝoj kiam ili estas avantaĝaj kaj antaŭaranĝitaj de Dio por avantaĝigi homojn, tiaĵoj jam pretigitaj kaj disponigitaj al homoj kiel elementoj kaj instrumentoj por ke tiuj kiuj je tio kapablas faru je ili bonan uzon⁶⁶. **2.** La instrumento⁶⁷, se je arto provizita, kapablas produkti artverkojn, sed se je tio

⁶¹ Mt 8,12.

⁶² V. Lk 19,5.

⁶³ V. Mk 2,14; Lk 5,27-29.

⁶⁴ V. Mt 9,9.

⁶⁵ V. Lk 19,9.

⁶⁶ Klemento por priskribi la korektan uzon de la riĉaĵoj utiligas tri terminojn: cr”mata, nome riĉaĵoj kiuj ne nur estas posedaĵoj (kt”mata), sed povas fariĝi avantaĝaj por aliaj homoj (cr”sima).

malprovizitas, ĝi profitas ja jes je muzikeco, sen tamen esti de ĝi la kaŭzo. **3.** Ankaŭ riĉo estas instrumento similspeca. Ĝin oni povas uzi laŭ justa maniero: kaj tiam ĝi estas je via servo por la justeco; ĝin oni povas uzi maljuste: tiam ĝi sin montras serviston de maljusteco. Fakte, ĝi estas el sia naturo por la servo, ne por rego. **4.** Do oni ne enscenigu kaŭzon tion kio el si mem ne estas nek bono nek malbono, estante senkulpa, sed tion kio povas fari uzon bonan aŭ malbonan laŭ la elekto antaŭfarita, kaj ĝuste pro tio mem estas kaŭzo. Tia ulaĵo estas la homa menso kiu havas en si mem kaj liberan juĝokapablon kaj sendependon de decido en la uzo de aĵoj al ĝi disponigitaj. **5.** Tiamaniere eblas elimini ne la bonaĵojn, sed la pasiojn de la animo, malebligantajn plej bonan utiligadon de siaj riĉaĵoj, ĉar, se faritaj bonaj kaj belaj, oni povu fari bonan uzon ankaŭ de tiuj posedaĵoj. **6.** Do, rezigni ĉion kion oni posedas kaj vendi siajn bonaĵojn oni interpretu tiamaniere, nome pripensante la animajn pasiojn.

15,1. Mi, do, dirus eĉ jenon: ĉar la pasioj estas ene de la animo, la riĉoj malene, se la animo faras je ili bonan uzon, eĉ ili aspektas bonaj, se male je ili faras malbonan, malbonaj. Ĉu Kristo, kiu instigas alieni bonaĵojn, ordonus ke estu forigataj la aĵoj posedataj, kiam plurestas la pasioj, antaŭ ol⁶⁷ la pasioj mem, sen kiuj ankaŭ la riĉoj fariĝas utilaj? **2.** Kiu do forĵetis laŭmondan riĉon povas plu esti riĉa je pasioj eĉ seniĝinta je

⁶⁷ Por esprimi diversajn manierojn de rilato inter la realaĵoj kreitaj, Klemento ofte utiligas la koncepton de instrumento kiu, ĉi-kaze, klare estas muzikilo.

⁶⁸ Teksto ne certa, divermaniere legata kaj interpretata.

materia riĉo: fakte, lia plejinterna dispozicio emigas al ĝi kaj al ĝi anhelas lia penso, opresite kaj flamigite de deziroj kune kreskantaj. Do, al li neniun avantaĝon alportis forliberiĝi de la riĉoj, se en li pludaŭris la pasioj. **3.** Fakte li ne forigis tion kio estis forĵetinda, sed tion kio estis indiferente⁶⁹ elimininda, kaj detranĉis el si tion kio estis je lia servo, kaj plifortigis la malbonajn puŝojn jam laŭnaturajn en tiu al kiu mankas eksteraj bonaĵoj. **4.** Necesas, do, disiĝi de bonaĵoj malutilaj, kaj ne de tiuj kiuj povas utili, se pri ili oni scias la rektan uzon⁷⁰. **5.** Kaj utilas la bonaĵoj kiuj estas administritaj kun saĝo kaj modereco kaj religieco, dum eliminendas kio nocas. **6.** Tiel la Sinjoro aprobas ankaŭ la uzon de eksteraj bonaĵoj, kiam li ordonas disiĝi ne de tio bezonata por vivi, sed de tiuj sintenoj kiuj kunportas pri tio malbonan uzon, nome de la mal-sanoj de la animo kaj pasioj.

16,1. La riĉo de pasioj fakte, kiam ĉeestas, anoncas morton por ĉiuj; kiam malĉeestas, portas savon, kaj ĝuste je tiu necesas purigi la animon, nome ĝin igi malriĉa kaj nuda, ĝin tiamaniere pretigante aŭskulti la Savanton kiu diras: “Venu kaj sekvu min⁷¹”. **2.** Li estas vojo por la korpurulo⁷², dum en mal-

⁶⁹ En la konsideroj pri la materiaj bonaĵoj, Klemento amplekse sin montras ŝuldanto al Stoikismo: la eksteraj realaĵoj estas fakte taksataj indiferentaj, ĉdifwra, laŭsintene kun la indiferenteco manifestita de stoikismo rilate ĉiujn bonaĵojn nespiritajn. Tamen, oni rimarku, ke dum por la stoikistoj estas la bonaĵoj el si mem indiferentaj, por Klemento estas la homo kiu ilin igas tiaj.

⁷⁰ Konceptoj larĝe uzitaj en la Pedagogo.

⁷¹ V. Mk 10,21.

⁷² Estas aludataj diversaj pasaĵoj evangeliaj.

puran animon ne descendas la Dia graco; estas certe malpura la animo riĉa je deziroj kaj turmentita pro multaj mondumaj amaĵoj.

3. Kiu posedas riĉaĵojn kaj oron kaj arĝenton kaj domojn ilin aprecante diaj donaĵoj, celebrante per ili la Dion kiu ilin al li donas por la savo de la homoj kaj konsciante ke mem tiaĵojn ricevis pli por la fratoj ol por si mem, kaj neestante sklavo de la posedo je ili, certe li ne estas sklavo de la riĉoj posedataj ĉar nek enfiksas tiujn ĉi en sian animon nek sur ilin izoliĝas kaj ĉirkaŭlimiĝas. Sed daŭre engaĝiĝante tra belaj kaj diaj agaĵoj kaj povante elteni kun gaja animo se iun tagon trafus mankon je ili, ankaŭ disiĝon el siaj bonaĵoj ne malkiel el ties abundo, tiu ĉi estas difinita beata de la Sinjoro kaj malriĉa en spirito. Tiu ĉi estas heredanto jam pretiĝinta por la dia regno, ne riĉulo kiu ne povas havi la vivon⁷³.

17,1. Tenanto, tamen, riĉon en sia animo kaj, anstataŭ Dia spirito oron kaj kampojn, senmezure plialtigas la posedemon kaj ĉiufoje puŝiĝas al plia posedo, la rigardon direktita mal-supren kaj enfaliĝante en mondumajn maŝojn, estante li tero kaj destinita terumiĝi⁷⁴: kiel tia homo povas deziri kaj imagi ĉielan regnon? Homo tiu ne havas koron sed kampojn aŭ metalojn, nepre identiĝos kun la elektitaj aĵoj. “Kie fidas la homa menso, tie estiĝas lia trezoro⁷⁵”.

2. La Sinjoro rekonas du tipojn trezorajn, tiu bona - fakte “la bona homo el bona trezorejo eltiras bonon” - kaj tiu malbona

⁷³ V. Mt 5,3.

⁷⁴ V. Gn 3,19.

⁷⁵ V.Mt 6,21; Lk 12,34: *St.r* VII 77,6.

- kaj tiun malbonan -: fakte “malbona homo eltiras malbonon el malbona trezorejo, ĉar el la abundo de la koro parolas lia buŝo⁷⁶”. **3.** Same kiel, do, ne estas unusola trezoro ĉe li kaj ĉe ni, kiu liveru grandan kaj abruptan gajnon al la trovanto, sed estas ankaŭ alia, tiu kiu ne akirigas gajnon kaj senvaloras kaj malfacile akireblas kaj danĝerigas⁷⁷, tiel estas ankaŭ riĉo je bonoj kaj riĉo je malbonoj se, kiel ni spertas, riĉo kaj trezoro, laŭnature, ne estas disigitaj unu de la alia. **4.** La unuan tipon de riĉo oni povas akiri kaj posedi, la alian oni ne devas akiri, male ĝi devas esti rifuzita: sammaniere ankaŭ la malriĉo en spirtio devas esti konsiderita beatiga. Tial Mateo aldonas “Feliĉaj la malriĉuloj”. Kiel? “en spirtio⁷⁸”. Kaj plue: “Feliĉaj kiuj malsatas kaj soifas dian justecon⁷⁹”. Malfeliĉaj tiam kiuj malriĉas malsammaniere: ne partoprenantaj en Dio kaj eĉ malpli en la homa riĉo, ili ne povas gustumi la Dian justecon.

18,1. Tiel ke necesas konsideri korekte, kaj ne krude, ne malrafinite kaj laŭvorte la kazon de riĉuloj kiuj malfacile eniros la ĉielan regnon⁸⁰: fakte ne tia estas la senco de kio dirita. La savo ne baziĝas sur eksterajoj, nek kiam ili estas multaj aŭ malmultaj aŭ malgrandaj aŭ grandaj aŭ gloraj aŭ sengloraj aŭ noblaj aŭ sennoblaj, sed sur la virto de la animo, fido, espero, amo al Dio⁸¹, frata amo, kono, mildo, modesteco kaj vero. De ĉiuj tiaj estas premio la savo. **2.** Fakte, pro la

⁷⁶ V. Lk 6,45; Mt 12.34-35.

⁷⁷ V. Mt 13,44.

⁷⁸ V. Mt 5,3.

⁷⁹ Mt 5,6.

⁸⁰ V. Mk 10,33.

⁸¹ V. 1Kor 13,13.

korpa belo oni ne supervivos nek pereos: sed kiu sin servas je la korpo al li donita ĉastmaniere kaj laŭdivole tiu vivos, dum kiu detruas la dian templon⁸² estos detruita. **3.** Oni povas vivi malĉastece ankaŭ en malbela stato kaj deteniĝemi en bela stato; nek la forto kaj imponeco de la korpo igas vivi nek la defekt-iĝemo de la korpo igas morti, sed la animo tiaĵojn uzanta estas la kaŭzo de la unua kaj de la alia. **4.** “Prezentu la vangon, do”, Li diras, “se vi estas frapata”, diro al kiu povas obei kiu fortas kaj bone fartas, dum kiu feblas, pro manko de anima forto, povas ĝin malobei⁸³. **5.** Tiel, ankaŭ se en stato de malriĉeco kaj bezono je ekzistigiloj oni povas esti ebria de deziroj, dum ankaŭ en riĉeco oni povas rezulti sobra kaj malriĉa je plezuroj, obea, saĝa, pura, modera,

6. Se, tial, kio supervivos estas precipe la animo⁸⁴ kaj la virto el ĝi naskiĝanta savas, dum la malvirto produktas morton, klare evidentiĝas ke se la animo estas savita, ĝuste ĝi malriĉas je tiaĵoj pro kies riĉecoj iu iĝas ruinigita⁸⁵, dum mortas se ĝi riĉas je tiaĵoj kies riĉeco kondukas al ruiniĝo; **7.** kaj ni ne plu serĉu en kiu ajn loko la kaŭzon de nia sorto se ne en la sinteno kaj animaj dispozicioj al la obeado al Dio kaj al pureco, aŭ en la malobeado al la ordonoj kaj en la akumulo de la malbonagado.

19, 1. Tial riĉa laŭ maniero vera kaj bela estas kiu riĉas je virto kaj kapablas sin kondukti ĉiukaze kun sankteco kaj fi-

⁸² V. 1Kor 3,17.

⁸³ V.Lk 6,29; Mt 5,39.

⁸⁴ La fakto ke la animo kaj ĝia saviĝo troviĝas en la kerno de la intereso de Klemento je malprofito de la korpo, kiu estas aferajo pure akcidenca, estas matrice platona.

⁸⁵ Traduko iom divenita.

do, dum la riĉulo nevera estas kiu riĉiĝas laŭkarne kaj metisian vivon en la posedo de eksteraj aĵoj, posedaĵo kiu finiĝas kaj putriĝas kaj pasas de unu al alia kaj fine apartenas al neniu, **2.** Kaj plue, sammaniere, estas malriĉulo vera kaj malriĉulo sintrompa kaj aŭtentika: la unua, tiu vera, estas laŭspirite malriĉa, tiu nevera, estas malriĉa laŭmonde. **3.** Al tiu kiu malriĉas laŭmonde kaj riĉas je pasioj, kiu ne estas malriĉa laŭspirite se riĉa laŭdie, estas dirate⁸⁶: “Disiĝu el eksteraj bonaĵoj kiuj amasiĝas en via animo por ke vi, fariĝinta kore pura, povu vidi Dion”, afero kiu, alivorte signifas eniri la dian regnon⁸⁷. **4.** Sed kiamaniere vi povus disiĝi el ili? Vendu ilin. Kiel do? Ĉu vi prenas monon, sanĝante riĉon kun riĉo transformante al mono la videblan riĉon? Ne, certel. **5.** Sed en la loko de la antaŭaj riĉecoj, enkondukante en la animon, tion deziranta, alispecan riĉon kiu diigas kaj alportas eternan vivon, nome interna dispozicio laŭ la dia ordono, pro kiuj vi ricevos rekompencan kaj rekonon, eternan vivon kaj eternan nekoruptecon. **6.** Tial vendu laŭdigne viajn propraĵojn, multnombrajn kaj nebezonajn kaj malpermesantajn la ĉielregnan aliron, ilin ŝanĝante kun tio kio povas vivo-savi⁸⁸. Tiujn konservu, male, la riĉuloj laŭkarnaj, kiuj ne sukcesas resti sen ili; vi dume, ricevinte sur ilia loko la riĉon laŭspiritan, povos jam havi trezoron en la ĉieloj.

20,1 Ne kompreninte en la ĝusta maniero tiujn aferojn, tiu riĉulo kaj observanto de la leĝo kaj ne sukcesinte kompreni kiel unu sama homo povas esti kaj malriĉa kaj riĉa, havi kaj

⁸⁶ Nome de Jesuo Kristo.

⁸⁷ Traduko diskutata ĉar nur hipotizata ĉar kohera kun la ĝenerala senso.

⁸⁸ V. Mk 19,21; Mk 10,23.

ne havi riĉaĵojn, uzi la mondon kaj ne uzi ĝin⁸⁹ li foriĝis malĝoja kaj silenta⁹⁰, forlasinte la vivlokon kiun li nur povis deziri sed ne atingi, ĉar maleblibliĝis al si kio estis malfacila.

2. Fakte estis malfacile ne lasi devojigi kaj ensorĉi sian animon per la mola kaj brila allogo kiu fontas el la luksa riĉeco, sed ne estas neeble atingi la savon ankaŭ en tiuj kondiĉoj, se oni direktiĝas el la sensebla riĉeco al tiu senkorpa kaj inspirita de Dio kaj se oni lernas uzi digne kaj bone la indiferentajn⁹¹ riĉaĵojn tiel ke oni direktiĝu al eterna vivo. **3.** Ankaŭ la disĉiploj, unuamomente, estis ili mem konsternitaj kaj timigitaj aŭskultinte tion⁹². Kial, do, eble ĉar eĉ ili havis multajn riĉaĵojn? Tamen jam de longe ili lasis tiujn samajn aferojn, la fiŝretojn, la fiŝhokojn kaj la fiŝboatojn. Tiuj ĉi estis iliaj nuraj avaĵoj. Kial, do, ili, timigitaj, diras: ”Kiu povas sin savi?”⁹³ **4.** Ili bone aŭskultis, kaj kiel disĉiploj, kion la Sinjoro estis dirinta pere de la parabolo kaj rekte⁹⁴ al ili kaj ili perceptis la profundan sencon de tiuj vortoj.

5. Do, ili estis esperplenaj, unuflanke, koncerne la savon, pro ilia manko je havaĵoj; sed ĉar ili sciis, ke ili ankoraŭ ne definitive disiĝis de la pasioj (fakte ili estis disĉiploj de antaŭ ne longe, kaj ekde mallonga tempo ili estis kolektita ĉirkaŭ Li

⁸⁹ 1Kor 7,31.

⁹⁰ Mk 10,22.

⁹¹ Nome kiuj ne havas rektan rilaton kun la virto kaj savo, kaj lasas la posedanton en la Apatia (απατία). Plua koncepto devenanta el la moralo de stoikisto.

⁹² Mk 10,26.

⁹³ Mk 10,26

⁹⁴ Klementa ekzegezo desegnas la komunikadon de Kristo per du manieroj: la parabolo kaj la rekta parolado.

de la Savanto) , “ili forte miregis⁹⁵” kaj malesperis por si mem ne malpli ol por tiu tre riĉa homo kiu estis firme ĉirkaŭita de siaj posedaĵoj, kiujn li antaŭmetis al la eterna vivo. **6.** Do, estis tute pravigita la timo por la disĉiploj ĉar kaj kiu posedas riĉaĵojn, kaj kiu estas plenplena je pasioj, el kiuj eĉ ili estis riĉaj, sammaniere ili estos forpuŝitaj el la ĉiela regno; fakte la savo apartenas al la animoj senaj je pasioj kaj puraj.

21,1. La Sinjoro respondas ke “Ĉe homoj tio neblas, sed ne tiel ĉe Dio; ĉar ĉio estas ebla ĉe Dio⁹⁶”. Denove, ankaŭ ĉi tiu esprimo plenplenas je granda saĝo en la senco ke la homo, eĉ egaĝigante en sia eno kaj penegante por propra forto atingi la liberiĝon el siaj pasioj, nenion gajnas, sed se evidentigas ke li tion ege deziras, kaj pro tio li sin devontigas, per la aldono de la dia povo, li sukcesas. **2.** Dio, fakte spiras kune kun la animoj kiuj tion volas, sed se ili malproksimiĝas de tiu deziro, ankaŭ la Spirito donita de Dio malproksimiĝas. Savi tiujn kiuj tion ne deziras, fakte estas io propra al kiu volas perforti, savi tiujn kiuj tion elektas mem, kontraŭe estas io propra al donacanto. **3.** Nek por la dormemuloj nek por la mallaboremuloj estas la ĉiela regno, sed la perfortuloj kaptas ĝin⁹⁷”; fakte tiu estas la nura bela perforto, perforti Dion⁹⁸ kaj trudpreni el Li la vivon. Tamen Li ekkompreninte ke iuj staras fronte al Li perforte, pli ĝuste tute certe, Li retiriĝas, ĉar Li ŝatas esti venkita en tiaj aferoj. **4.** Tial aŭdinte tiaĵojn, la beata Petro, la elektita, la preferata, la unua inter la disĉiploj, pro kiu nure krom por Si mem la Savanto

⁹⁵ Mk 10,26.

⁹⁶ Mk 10,27.

⁹⁷ Mt 11,12.

⁹⁸ Teksto diskutata.

elaĉetis la tributon⁹⁹, rapide komprenis la sencon kaj la paroladon. **5.** Kaj kion li diras? “Jen ni ĉion forlasis kaj vin sekvis¹⁰⁰”. Kaj se per “ĉion” li aludas siajn havaĵojn, eble kvar obolojn¹⁰¹ laŭ la proverbo, li pligrandigas la forlasitaĵojn kaj, li, tiamaniere, senkonscie, deklarus ke la ĉiela regno egalvalorus siajn havaĵojn mem; **6.** Sed, se, kiel ni ĵus diris, forĵetinte la malnovajn mensajn posedaĵojn kaj la spiritajn malsanojn, ili sekvas paŝon post paŝo la Majstron, tiu esprimo devus rilati al kiuj kies nomoj estos skribitaj en la ĉielo¹⁰². **7.** Tio fakte signifas vere sekvi la Savanton, imiti Lian distanciĝon el la peko kaj Lian perfektecon kaj, rigardinte lin kiel antaŭ spegulo, plibeligi nian animon ĝin harmoniigante kaj egalmaniere pretigante ĉion en ĉio.

22,1 “Kaj respondinte, Jesuo diris: Vere mi diras al vi ke kiu forlasos siajn havaĵojn kaj siajn gepatrojn kaj siajn gefratojn kaj siajn riĉaĵojn pro mi kaj pro la evangelio, tiu ricevos centoble en ĉi tiu tempo¹⁰³”. **2.** Sed eĉ ne tio nin malkvietigu, nek tio kio eĉ pli krude ol tio estas dirite aliloke per jenaj vortoj; “kiu ne malamas siajn patron kaj patrinon kaj siajn infanojn kaj eĉ ankaŭ sian vivon mem, tiu ne povas esti mia disĉiplo¹⁰⁴”. **3.** Ne instigas nin al malamo kaj al disigo de niaj plej karauloj la Dio de la paco, Li kiu nin invitas ami ankaŭ

⁹⁹ Mt 17,27.

¹⁰⁰ Mk 10,28.

¹⁰¹ La esprimo, certe iom tiam onidira, estis imago eluzata en la klasika medio, tiom ŝatata de Klemento.

¹⁰² Lk 10,20; Hebr 12,23.

¹⁰³ Mk 10,29s.

¹⁰⁴ Lk 14,26.

la malamikojn¹⁰⁵. **4.** Se oni devas ami la malamikojn, analogie de tio devenas ke oni devas ami ankaŭ la plej proksimajn pro parenca ligo; se, kontraŭe, oni devas malami la plej proksimajn pro sangaj ligoj, tre pli multe la parolado kiu de tie devenas instruas malami la malamikojn, tiel ke la paroladoj kontraŭas inter si kaj sin nuligus unu la alian. **5.** Sed ili tute ne sin nuligas reciproke, ĉar per la sama pensmaniero kaj per la sama intima inklino kaj sammezure malamus la patron kaj amus la malamikon kiu nek venĝas pri la malamiko, nek respektas la patron pli ol Kristo. **6.** Fakte per la unua parolado Li forigas la malamon kaj la malbonfaradon, dum per la dua Li nin instigas forigi malĝustan respekton al la familianoj kiam tiu montriĝas danĝera por nia savo. **7.** Se, do, oni havus senreligiajn patron, infanon aŭ fraton kaj tiu ĉi fariĝus malhelpo por la kredo kaj ligo por la eterna vivo, tiu ne akordiĝu kun li kaj ne pensu sammaniere kiel li, sed li dissolvu la parencon rilaton truditan de la karno pere de la malamikeco motivita de la spirito.

23, 1. Imagu ke okazu proceson kaj ke via patro, estante apud vi, diru al vi: “mi vin koncipigis kaj vin kreskis, aŭskultu min kaj faru kun mi malbonaĵojn kaj ne obeu la leĝon de Kristo” kaj ke li diru al vi ĉiujn tiujn aferojn kiujn povus diri blasfemulo kaj homo mortinta en sia koleriga stato¹⁰⁶. **2.** El alia flanko aŭskultu la Savanton: ”Mi vin renaskis¹⁰⁷, vin kiu estis malbone naskita de la mondo por la morto, mi vin liberigis, mi vin kuracis, mi vin elaĉetis; kaj mi vin donos sen-

¹⁰⁵ Mt 5,44; Lk 6,27.35.

¹⁰⁶ Vidu Ef 2,1.3.

¹⁰⁷ 1Pt 1,3.

finan vivon¹⁰⁸, transtempan, kiu transcendas la mondon; mi elmontras al vi la vizaĝon de Dio¹⁰⁹ patro bona”. ”Nomu neniun sur la tero via patro¹¹⁰”. “Lasu la mortintojn enterigi siajn mortintojn¹¹¹”, “Vi, sekvu min¹¹²”; **3.** “Mi kondukos vin kaj mi vin ripozigos¹¹³” al loko de feliĉigaĵoj pri kiuj ne estas permesate al homo paroli¹¹⁴ kaj diri”, “kiujn okulo ne vidis¹¹⁵ kaj orelo ne aŭdis, kaj kiuj en la koron de homo ne eniris”, bonoj en kiuj anĝeloj deziras enrigardi¹¹⁶, kaj vidi la bonaĵojn preparitajn por la sanktuloj kaj por la filoj kiuj Lin amas. **4.** Mi estas tiu kiu vin nutras, donante al vi min mem¹¹⁷ kiel pannon, manĝante kiun neniu pli spertas morton kaj doninte al vi ĉiutage trinkaĵo por senmorteco; mi estas majstro pri ĉielaj instruoj; por vi mi luktis kontraŭ la morto kaj mi elaçetis vian morton, kiun vi ŝuldas pro la antaŭaj pekoj kaj pro via manko je fido al Dio¹¹⁸. **5.** Post kiam vi aŭskultis de unu flanko kaj de la alia tiujn paroladojn bonvolu juĝi vi mem kaj voĉdonu por via savo; kaj se eĉ frato, infano, edzino aŭ kiu ajn diras similaĵojn, fronte al ĉiuj estu Kristo kiu venku en vi, ĉar Li luktas por vi.

¹⁰⁸ Joh 10,28.

¹⁰⁹ Joh 14,18.

¹¹⁰ Mt 23,9.

¹¹¹ Mt 8,22.

¹¹² Lk 9,60.

¹¹³ Mt 11,28ss.

¹¹⁴ 2Kor 12,4.

¹¹⁵ 1Kor 2,9.

¹¹⁶ 1Pt 1,12.

¹¹⁷ Joh 6,50ss.

¹¹⁸ Interplekto de diversaj novtestamentaj elementoj.

24.1. Ĉu vi povas esti supera al la riĉaĵoj? Diru tion kaj Kristo ne vin deturnos el viaj posedaĵoj, ĉar la Sinjoro ne ĵaluzas¹¹⁹. Kontraŭe, ĉu vi vin vidas superregata kaj renversata? Lasu ilin kaj ilin forĵetu, malamu ilin, disigu vin el ili kaj el ili forkuru. **2.** “Kaj se via dekstra okulo faligas vin, elŝiru kaj forĵetu ĝin tuj¹²⁰”. Estas preferinda la regno de Dio por tiu kiu havas unu nuran okulon ol la fajro por tiu kiu estas tute integra; kaj se vin faligas mano, piedo, animo¹²¹, ilin malamu. Se fakte tie ĉi oni mortas por Kristo, “tie ni estos savitaj¹²²”.

25,1. Ankaŭ la sekvo spegulas tiun penson. “Nun, havi en tiu ĉi tempo kampojn kaj posedaĵojn kaj domojn kaj gefratojn kune kun persekutoj, pro kia avantaĝo?¹²³”. **2.** Fakte Li ne (nur) vokas al la vivo nek homojn nenionhavajn, nek senhejmulojn, nek homojn sen gefratoj, ĉar li vokis ankaŭ la riĉulojn, sed laŭ la maniero kiun ni jam diris, kaj sammaniere li vokis fratojn kiel Petron kun Andreo kaj Jakobon kun Johano la filojn de Zebedeo¹²⁴, sed en la komuneco de pensoj inter si kaj kun Kristo. **3.** Kontraŭe, Li ekskludas ke oni havu tiaĵojn “kune kun persekutoj”: persekuto venas de ekstere, de la homoj, aŭ pro malamikeco aŭ pro envio aŭ pro profitavido aŭ pro la diabla energio de homoj repuŝantaj la kredantojn; **4.** la

¹¹⁹ La malĉeesto de envio, en la dioj, aperas ofte en verkoj de Platono, tiom estimata de Klemento el Aleksandio.

¹²⁰ Mt 5,29s; Mk 9,43.45.47.

¹²¹ Lk 14,26.

¹²² Teksto parte integrita per la sampensaj vorteroj de Mk 8,35 kaj aliaj evangelioj.

¹²³ Mk 10,30.

¹²⁴ Mk 4,18.22; Mk 1,16-20; Lk 5,1-11; Joh 1,40-42.

plej obstakla persekuto, male devenas el la interno, ekscita en ĉiu homo de la animo mem koruptita de sendiaj deziroj kaj de multnombraj plezuroj kaj de malplenaj esperoj kaj de sonĝoj destinitaj foriĝi kiam ĝi, estante kaptita de la sopir-ego posedi ĉiam pli da havaĵoj kaj furozigita kaj bruligita de sovaĝaj amoj¹²⁵, sin sangobanas per pasioj kvazaŭ ĝi estus pinĉita de pikiloj aŭ de tabanoj, por sin ĵeti en frenezaj penoj kaj en malespero pri vivo kaj malŝato al Dio. **5.** Tiu estas persekuto plej peza kaj malfacila ol la alia, ĉar ĝi moviĝas el la eno, ĝi ĉiam ĉeestas kaj ne povas esti forpelita de tiu kiu estas turmentata de ĝi; fakte ĝi kunportas la malamikon kun si mem ĉien ajn¹²⁶. **6.** Tiel ankaŭ la fajrego¹²⁷ kiu surverŝiĝas de ekstere produktas selekton, dum tiu kiu surverŝiĝas de interne alportas la morton. Ankaŭ milito, kiam ĝi estas elekstera, finiĝas facile, dum tiu de la animo pludaŭras ĝismorte. **7.** Se vi kune kun tia persekuto havas rimarkindan riĉaĵon kaj samsangajn fratojn, kaj eĉ aliajn certecojn, forlasu ilian posedon kiu kondukas al malbono, havigu al vi la paco, liberigu vin de longa persekuto, turnu vin, el tiaj aferoj, al la Evangelio, preferu la Savanton, la konsilanton kaj la konsolanton de via animo, la reganton de la senfina vivo ol ĉiujn aferojn. **8.** “La vidataĵoj estas tempaj, sed la nevidataĵoj estas eternaj¹²⁸” kaj en la estanteco ili estas forpasemaj kaj malcertaj, “en la estonteco estas la eterna vivo”.

¹²⁵ Tiu ĉi figuro oftas en Platono.

¹²⁶ Estas temo, krom biblia, platona.

¹²⁷ 1Kor 3,13; Pt 4,12.

¹²⁸ Mk 10,31.

26,1 ”La unuaj estos lastaj, kaj la lastaj estos unuaj¹²⁹”. Tiu esprimo estas submetebla al diversspeca interpreto kaj pri la signifo kaj pri la klarigo, sed ĝi ne bezonas nian esploron ĉi momente, ĉar ĝi ne koncernas nur tiujn kiuj posedas multajn riĉaĵojn, sed simple ĉiujn homojn kiuj sin dediĉas por ĉiam al la fido, do, por momente ni flankenmetu la paroladon. **2.** Rilate al la temo kiun ni proponis al nia prikonsidero mi opinias ke oni jam bone pruvis kiel nenio estas malsupera al promeso, ĉar la Savanto neniel ekskludis la riĉulojn pro la riĉaĵo en si mem kaj pro la abundo de la posedaĵoj, nek Li baris la savon, se ili povas kaj volas submetiĝi al la ordonoj de Dio kaj se ili konsideras sian vivon pli ol la momentaj aferoj kaj rigardas al la Sinjoro per viglaj okuloj, kiel rigardante la signon de bona ŝipestro, pri kio li deziras, pri kio ordonas kaj indikas, pri kia signo li donas al siaj maristoj, pri kie kaj pri kiaflanke li promesas alfiksiĝon. **3.** Fakte kian maljustaĵon faras iu, se atente kaj ŝparante monon antaŭ ol atingi la fidon li rikoltis sufiĉe da vivrimedoj? Aŭ ankaŭ, afero eĉ pli neriproĉebla ol tia, se ekde sia naskiĝo li estus metita vivi en grandega gento, forta pro bonaĵoj kaj potenca pro riĉaĵoj, de la Dio kiu donas la animon? **4.** Se, fakte pro la senvola naskiĝo en la riĉeco tiu ulo estus forpuŝita el la vivo, li plivere ricevus maljustaĵon de la Dio kiu lin generis, ĉar li estus taksita inda je mallongdaŭra dolĉo, sed senigita je senfina vivo. **5.** Kial, do, la riĉeco estus devinta kreski surtere, se estus distribuanto kaj peranto¹³⁰ de morto? **6.** Sed se oni sukcesas trafi la plej mallarĝan

¹²⁹ Mk 10,31.

¹³⁰ La du imagoj corhgÕj (distribuanto) kaj prÒxenÒx (peranto) estas ĉerpitaj el la greka kulturo, uzataj kiel anoncantaj male ĉi-kaze pri morto.

kurbon interne de siaj posedaĵoj¹³¹, kaj pensi modere kaj esti sobra kaj se li serĉas nur Dion kaj spiras Dion kaj estas kun-civitano de Dio, tiam li sin montras kiel povrulon fronte al la dek ordonoj, nome libera, nevenkebla, senmalsana, nevundita de la riĉaĵoj; **7.** Kontraŭe estos pli facile por kamelo iri tra kudrilan trueton, ol por tia riĉulo eniri la regnon de Dio¹³². **8.** Oni, tial, interpretu kiel ion plej altan la kamelon trairantan laŭ mallarĝa kaj malglata vojo¹³³ pli facile ol riĉulo; tiu estas mistero de la Savanto kiun ni povas lerni en la verko *Ekzegezo de la teologiaj principoj*¹³⁴.

27,1. Ĉiukaze, tamen, la esprimmaniero devos oferti unuan klaran kaj laŭliteran signifon de la parabolo. Tiu ĉi devas instrui al la riĉuloj ke ili ne neglektu sian savon kvazaŭ ili jam estus damnitaj nek ili ĵetu al la maro la riĉon, nek ĝin kondamnu kvazaŭ ion trompeman kaj malfavoran al la vivo, sed ĝi instruu al ili ke ili devas iamaniere lerni kaj kiel uzi la riĉaĵon kaj kiamaniere atingi la vivon. **2.** Ĉar oni absolute ne damniĝas pro la nura fakto ke oni estas riĉa kaj oni timas, kaj absolute oni ne sin savas pro tio ke oni estas kuraĝa kaj fidas

¹³¹ La esprimo, kiu povas prezentiĝi malfacile komprenebla, estas ĉerpita el ĉevalkuroj: la ĉevaloj, ene de la hipodromo, por mallongigi la trakurandan spacon, devis ĝiri plej eble proksime de la ekstremaj ŝtonoj. Per ĝi Klemento sugestas ke kristano devas plejenergie engaĝiĝi por atingi la savon.

¹³² Mk 10,25.

¹³³ Mt 7,14; Orig Contra Cels VI,16.

¹³⁴ Temas pri perdita verko de Klemento, pri kiu ni trovas kelkajn informojn en la Stromatoj, kaj kiu pritraktis la ekkonajn kaj ontologiajn principojn de la realo rilate la kredon kaj kristanisman.

je la fakto ke oni estos savita; necesas esplori kiun esperon sugestas al ili la Sinjoro, kaj kiel la neesperitaĵo povas fariĝi certaĵo, nome kio esperata povas ŝanĝiĝi al plena posedo.

Karakterizoj de la kristana amo

3. La Majstro, do, pridemandita kiu estas la plej grava el la dek ordonoj, diras: ”amu la Eternulon, vian Dion, per via tuta koro kaj per via tuta animo kaj per via tuta menso kaj per via tuta forto¹³⁵” kaj ke neniu ordono estas pli granda ol tiu ĉi, kaj prave. **4.** Kaj fakte tiu ordono estis donita koncerne la ĉefan kaj pli gravan realon, la saman Dion nian patron, danke al kiu ĉio naskiĝis kaj ekzistas kaj al kiu reiros ĉiuj realaĵoj kiuj sin savos¹³⁶.

5. Ĉar ni estis amitaj de Li ekde la komenco kaj ni estis estiĝitaj de Li, estus sakrilegio konsideri ion alian pli venerindan kaj pli respektindan ol Lin, ĉar ni povas nur doni interŝanĝe tiun etan signon da dankemo pro tiuj grandegaj bonaĵoj, ĉar ni havas nenian por doni interŝanĝe al Dio kiu bezonas nenion kaj perfektas krom turni nian penson kaj samtempe ami la Patron ricevante nekorukteblon por nia forto kaj kapablo mem. Fakte ju pli oni amas Dion des pli profunde oni mergiĝas en Li.

28,1. La dua ordono en la serio, sed absolute ne pli malgrava ol tiu ĉi Li diras ke estas ”Amu vian proksimulon kiel

¹³⁵ Mt 22, 36-39; Mk 12,29-30; Lk 10,27-28. Tiu.ĉi verka sekcio, pivotiĝita de la amo al Dio kaj al la proksimularo, utilas por plie klarigi la parabolon pri la riĉa junulo. La sola precepto de amo estas subdividita laŭ “gradoj” de intenseco, amo al Dio antaŭ ĉio kaj amo al proksimularo.

¹³⁶ Rm 11.36.

vin mem¹³⁷”; do, eĉ Dion kiel vin mem. Ĉar la interparolanto demandis al Li “Kiu estas mia proksimulo?¹³⁸”, Li ne izolis la koncepton, kiel faras la Judoj, nur koncerne la samsangecon, nek rilate al la kuncivitanoj nek al la sekvantoj, nek, same rilate al la cirkumcidito nek al la sekvanto de la nura kaj sama leĝo; **3.** prefere li priskribas per parabolo homon kiu malsupreniris de Jerusalemo al Jeriĥo; kaj lin montras falintan en la manojn de rabistoj, kiuj lasis lin duone senviva. kaj preterpasitan de pastro, neprizorgitan de Levito, kaj, kontraŭe zorgitan mizerikorde fare de la Samariano, kiu estis neglektata kaj flankenmetata. Kaj tiu ĉi ne hazarde pasis tien¹³⁹, sed li alvenis post kiam li pretigis tion kion bezonis la homo en vivdangero: vinon, oleon, bandaĵojn, ŝarĝobeston, monon por la gastejestro, kiun parte jam li donas al tiu homo, kaj parte estas promesita al li. **4.** “Kiu” diras Jesuo, “el tiuj homoj fariĝis la proksimulo de tiu kiu suferis terurajn turmentojn?”. Kai la interparolanto respondis: “Tiu, kiu faris al li kompaton”. “Kaj Jesuo diris al li: Iru vi, kaj faru tion saman”, ĉar la amo florigas la bonfaradon.

29,1. En ambaŭ ordonoj, do, Li enmetas la amon sed Li ĝin distingis laŭ ordo, kaj Li atribuas la unuan rangon al amo al Dio, la duan rangon al amo al proksimuloj. **2.** Sed kiu alia povus esti tiu persono krom la Savanto mem? Aŭ kiu pli ol

¹³⁷ Lk 10,27-29.

¹³⁸ Estas enkondukita ĉi tie la parabolo pri la bona Samariano (Lk 10,30-37) kiu ĉi-kaze estas interpretita laŭkronologia senco: la Samariano estas Kristo kiu elĉielis, ne pro hazardo, sed por prizorgi la homaron afliktitan. Tiu interpreto fariĝos ofta en postaj epokoj.

¹³⁹ Lk 10,31

Li faris kompaton al ni preskaŭ mortigitaj de la regantoj de tenebroj¹⁴⁰ per multe da vundoj, timoj, deziroj, koleroj, doloroj, eraraj, kaj plezuroj¹⁴¹? **3.** La ununura kuracisto de tiuj ĉi vundoj estas Jesuo kiu komplete forigas la pasiojn, nek kiel la leĝo kiu tranĉis nur la simplajn rezultojn, la fruktojn de la malbonaj plantoj, sed Li agiogas sian hakilon ĉe la radikoj¹⁴² de la malbono. **4.** Li verŝis sur niajn vunditajn animojn¹⁴³ la vinon, la sangon de la vinberarbo de Davido¹⁴⁴, Li portis kaj abunde disdonis la oleon la kompaton kiu devenas de la amemo de la Patro, li montris al ni la rezistajn bandaĵojn de la sano kaj de la savo, fidon, esperon kaj karitaton, Li ordonis al anĝeloj, al princecoj kaj potencoj ke ili nin servu¹⁴⁵ interŝanĝe de granda rekompenco, ĉar ankaŭ ili estos liberigitaj el la vaneco de la mondo pere de la revelacio de la gloro de la Difiloj¹⁴⁶. **5.** Do ni devas ami Lin kiel ni amas Dion. Amas Jesuon Kriston kiu faras Lian volon kaj gardas Liajn ordonojn¹⁴⁷. “Fakte ne ĉiu, kiu diras al mi: Sinjoro, Sinjoro, eniros en la reĝnon de la ĉielo; sed tiu, kiu plenumas la volon de mia Patro, kiu estas en la ĉielo¹⁴⁸”. Kaj: “Kial vi min vokas: Sinjoro, Sinjoro; kaj ne faras tion, kion mi diras?¹⁴⁹” Kaj:

¹⁴⁰ Ef 6,12.

¹⁴¹ Vidu Ped I,101 kaj Str II 119.

¹⁴² Mt 3,10; Lk 3,9; Peg II 51,2.

¹⁴³ Joh 15,1.

¹⁴⁴ Did 9,2.

¹⁴⁵ Hebr 1,14; Ef 3,10.

¹⁴⁶ Rm 8,19-21.

¹⁴⁷ Joh 14,15.23.

¹⁴⁸ Mt 7,21.

¹⁴⁹ Lk 6,46.

“Feliĉaj vi kiuj vidas kaj aŭdas kion nek justuloj nek profetoj vidis kaj aŭdis¹⁵⁰”, se vi faras kion mi diras al vi¹⁵¹.

30,1. Unualoke estas kiu amas Kriston, dualoke estas kiu honoras kaj prizorgas tiujn kiuj kredas je Li. Fakte, kion oni faras al disĉiplo tion la Sinjoro akceptas kiel direktitan al Si mem kaj Li tion konsideras komplete Sian. **2.**” Venu, vi benataj de mia Patro, heredu la regnon preparitan por vi de post la komenco de la mondo; ĉar mi malsatis, kaj vi donis al mi manĝi; mi soifis, kaj vi donis al mi trinki; mi estis fremda, kaj vi gastigis min; nuda, kaj vi vestis min; mi malsanis, kaj vi vizitis min; mi estis en malliberejo, kaj vi venis al mi. **3.** “Tiam respondos al li la justuloj, dirante: Sinjoro, kiam ni vin vidis malsata, kaj vin satigis? aŭ soifanta, kaj sensoifigis vin? Kiam ni vidis vin fremda kaj gastigis vin? aŭ nuda, kaj vin vestis? Kiam ni vidis vin malsana aŭ en malliberejo, kaj venis al vi? **4.** La Reĝo respondos kaj diros al ili: “Vere mi diras al vi: Kion vi faris al unu el ĉi tiuj miaj fratoj la plej malgrandaj, tion vi faris al mi¹⁵²”. **5.** Male Li ĵetos en la fajron kiujn ne oferdonis al ili tiaĵojn¹⁵³. Kaj aliloke: “Kiu vin akceptas, tiu min akceptas, kiu vin ne akceptas tiu Min rifuzas¹⁵⁴”.

31,1. Ĉi tiuj Li nomiĝas ankaŭ filoj, infanoj, infanetoj, amikoj kaj etuloj¹⁵⁵ kvszaŭ rigardante ilian estontan grandecon tie supre, dirante: “Gardu vin, ke vi ne malestimu unu el tiuj

¹⁵⁰ Mt 13,16s.

¹⁵¹ Joph 13,17.

¹⁵² Mt 25, 34-40.

¹⁵³ Mt 25,41-45.

¹⁵⁴ Mt 10,40; Lk 10,16.

malgranduloj; ĉar iliaj anĝeloj en la ĉielo ĉiam rigardas la vizaĝon de mia Patro, kiu estas en la ĉielo¹⁵⁶. **2.** Kaj aliloke: “Ne timu, malgranda grego; ĉar bone plaĉis al la Patro doni al vi la regnon¹⁵⁷” de la ĉielo. **3.** Sekvante la saman penson Lia diras ke ankaŭ la plej eta en la ĉiela regno, tio estas Lia disĉiplo, estas pli granda ol Johano kiu estas la pli granda inter la naskitoj de virino¹⁵⁸. **4.** Kaj eĉ: “Kiu akceptas profeton en la nomo de profeto, tiu ricevos rekompenco de profeto; kaj kiu akceptas justulon en la nomo de justulo, tiu ricevos rekompenco de justulo. Kaj kiu donacos sensoifaĵon al disĉiplo, ĉar disĉiplo, per taso da malvarma akvo, tiu ne perdos sian rekompenco¹⁵⁹. Do, tia estas la rekompenco kiu ne perdiĝas. **5.** Kaj denove: ”Faru al vi amikojn per la mamono de maljusteco, por ke, kiam ĝi mankos, oni akceptu vin en eternajn loĝejojn¹⁶⁰” **6.** asertante ke ĉiu posedaĵo kiun oni havas por si mem kiel sian propran kaj ne metas ĝin en komuneco kun la bezonuloj¹⁶¹ estas maljusta laŭnature, sed ke per tiu maljusta realaĵo oni povas fari justaĵon kaj savantan agon: doni revigligon al iu kiu havas eternan loĝejon ĉe la Patro. **7.** Bonvolu, antaŭĉio konsideri ke la Savanto ne ordonis al vi ke vi estu preĝpetata nek ke vi atendu ke oni vin humile petu,

¹⁵⁵ En multaj pasaĝoj evangeliaj estas uzataj tiaj vokmanieroj, ekz. Mk 10,24 (filoj); Joh 21,5 (infanoj); Mt 11,25 (beboj); Lk 12,4 kaj Joh 15,14 (amikoj); Mt 10,42 (etuloj).

¹⁵⁶ Mt 18,10.

¹⁵⁷ Lk 12,32.

¹⁵⁸ Vidu Mt 11,11; Lk 7,28.

¹⁵⁹ Mt 10,41s.

¹⁶⁰ Lk 16,9.

¹⁶¹ Ag 4,32.

sed ke estu vi mem kiu serĉas tiujn kiuj indas esti aŭskultataj kaj kiuj estas liaj disĉiploj. **8.** Do estas bela eĉ la diraĵo de la disĉiplo:” Dio amas donacanton ĝojan¹⁶², tiun kiu ĝojas donacante kaj ne semas ŝpare, por ke ne rikoltu sammaniere, sed metante en komuneco ĉion sen plendoj kaj distingoj kaj sen afliktiĝoj, per kiuj bosigās la vera bonfarado. **9.** Supera al tiu estas tio kion diras la Sinjoro aliloke:” Donu al ĉiu, kiu petas de vi¹⁶³: fakte karakterizas Dion mem tia disponebleco al la donacemo. Kaj preter ĉiu diaĵo estas tiu vorto, tio estas ne atendi ke oni vin preĝpetu, sed serĉi tiun kiu indas ricevi la bonon, poste akiri per la kunpartigo rekompencan tiel grandan, eternan loĝejon.

32,1. Ho kia bela rilato kaj kia dia kontrakto! Oni aĉetas la nekorupteblon pere de la mono kaj donante la vantajn mondaĵojn pereigantaj, oni ricevas interesanĝe nur tion kio el tiaj aferoj estas eterna en la ĉielo. **2.** Velu al tiu ĝenerala kunveno¹⁶⁴, ho riĉulo, se vi estas saĝa homo, kaj se estas necese ĉirkaŭiru la tutan teron¹⁶⁵, ne ŝparu al vi la danĝeroj kaj la penojn por akiri ĉi tie la ĉielan regnon. **3.** Kial tiom vin ĝojigas travideblajn ŝtonojn kaj smeraldojn kaj domon kiu vivtenas la fajron aŭ estas ludo por la trivadtempo¹⁶⁶, aŭ logaĵo por la tertremo, aŭ ofenda altiro por la subpremanto? **4.** Kontraŭe, vi deziru loĝi en la ĉielo kaj regi kun Dio, kaj tiun ĉi regnon al vi donos homo imitanta Dion: pro la fakto ke li ricevis ĉi tie etaĵojn, li faros el

¹⁶² 2Kor 9,7.

¹⁶³ Lk 6,30.

¹⁶⁴ Vidu Hbr 12,22.

¹⁶⁵ Vidu Mt 23,15.

¹⁶⁶ Koncepto ĉeesta ankaŭ en Gregoro el Nazianco.

vi sian intimulon por eterne. **5.** Humile petu lin ke li vin akceptu: agu intense, luktu, timu ke li ne vin honoru: fakte oni ne ordonis akcepti, sed al vi oni ordonis oferdoni. **6.** Fakte la Sinjoro ne diris: “Donu” aŭ “oferdonu” aŭ “bonfaru”, “iru helpi” aŭ “akiru al vi amikon”: oni, fakte, ne akiras al si amikon per unu nura donaco, sed donante al li kompletan subtenon kaj per longa kunesto: fakte nek la fido, nek la amo, nek la forto el ununura tago vin savos, sed kiu persistos ĝis la fino, tiu estos savita¹⁶⁷.

33, 1. Kiel, do la homo povas fari tiajn donacojn? Ĉar la Sinjoro donas pro la konsidero kiun Li havas al la homo mem, pro Lia bonvolemo kaj intimeco al li. “Mi donos, fakte, ne nur al amikoj, sed eĉ al amikoj de la amikoj¹⁶⁸”. **2.** Kaj kiu estas tiu amiko de Dio? Vi ne juĝu pri kiu estas inda kaj kiu estas malinda: fakte eblas ke vi eraras en via juĝo; prefereblas, en dubo pri sia scio, ke oni bonfaru ankaŭ al la malinduloj pro la induloj ol malebligi al malplibonuloj alproksimiĝi al perfektaj homoj. **3.** Fakte, hezitante kaj pretendante apartigi la meritulojn el la malmerituloj, eblas ke vi flankenlasas kelkajn kiuj estas karaj al Dio, kaj la rekompenco pro tio estas la puno je la eterna fajro; kontraŭe, donante al ĉiuj bezonuloj, vi sendube trovos ankaŭ iujn el tiuj kiu povas vin savi ĉe Dio. **4.** Do, ”Ne juĝu, por ke vi ne estu juĝataj. Ĉar per kia juĝo vi juĝos, per tia vi estos juĝitaj; kaj per kia mezuro vi mezuros, per tia oni mezuros al vi; bona mezuro, premita, kunskuita, super-

¹⁶⁷ Mt 10,22 kaj Mk 13,13.

¹⁶⁸ Klemento neprope atribuas al Jesuo esprimon kiu ne estas atestata en la kanonaj evangelioj. Klemento, fakte, ne disdegnas ankaŭ la literaturon neoficialan, sed bible inspiritan: Li ĉerpas el ĝi konscie, zorgeme distingante la oficialaĵojn el la netiaj,

fluanta, estos al vi redonita¹⁶⁹”. **5.** Malfermu vian sinon per Amo¹⁷⁰ al ĉiuj kiuj estas alkalkulitaj kiel disĉiploj de Dio, sen rigardi suspekteme al iliaj korpoj, sen ilin neglekti pro ilia aĝo, sen senti ĝenon en via animo aŭ vin turni aliflanke se iu montriĝas senhava, malbone vestita, misforma aŭ malsana. **6.** Tiu estas la formo kiu aperas de ekstere, ĝi estas envolvita ĉirkaŭ ni antaŭvide de nia traĭro en la mondo, tiel ke ni povu eniri tiun komunan lernejon; sed kaŝita ene, loĝas¹⁷¹ la Patro kaj Lia Filo, kiu mortis por ni kaj por ni resurektis.

34,1. Ĉi tiu videbla formo trompas¹⁷² la morton kaj la diablon, ĉar la enaj riĉo kaj belo estas nevideblaj al ili; kaj ili obstine atakas la karnon; ĝin ili malŝatas konsiderante ĝin malfortan, ĉar ili ne povas vidi la internajn bonojn, ne sciante “kia trezoro estas entenata en argila vazo”, ĉie ŝirmita de la potenco de Dio la Patro, kaj de la sango de la Difilo kaj de la roso de la Sankta Spirito. **2.** Sed vi ne trompu vin, vi kiu gustumis la veron kaj estis juĝita inda je la granda elaĉeto, sed, kontraŭe, vi rekrutiĝu en senarmilan, senbatalan armeon, kie oni ne elverŝas sangon kaj estas senpasia, malofenda, konstituita je maljunaj religianoj, orfoj amitaj de Dio, vidvinoj armitaj per mildeco, viroj ornamitaj per amo. **3.** Akiru, per via riĉaĝo, kiel gardistoj de korpo kaj animo, tiajn homojn, kies kondotiero estas Dio; danke al ili dronanta ŝipo reelmergi-

¹⁶⁹ Mt 7,1s; Lk 6,68.

¹⁷⁰ Laŭlitere “per la visceroj”, esprimo eluzata por indiki la plej intiman sferon

¹⁷¹de la amo el Dio, kaj do ties tenerecon.

Vidu Joh 14,23.

¹⁷² Temas pri figuro ofta en la patristikaj tekstoj.

ĝas, estante mastrumata nure de la preĝoj de la sanktuloj, kaj malsano en sia kulmino estas venkita, forpelita per mansurmeto, atako de rabistoj estas malarmigita, prirabita de piaj preĝoj, kaj la diabla perforto estas dispecigita, minacita de gravaj ordonoj.

35,1. Ĉiuj tiuj homoj estas viglaj armeanoj kaj fidindaj gardistoj, neniu el ili estas mallaborema, neniu el ili estas senutila. Unu povas propeti por vi ĉe Dio, alia povas doni al vi konsolon kiam vi estas laca, alia, spertinte vian saman suferon, povas plori kaj ĝemi por vi antaŭ la Sinjoro de ĉiuj homoj, alia povas instrui al vi ion utilan por via savo, alia povas vin resanigi sincere, alia povas vin konsili ameme, ĉiuj povas vin ami vere, sen trompoj, sen timoj, sen hipokritecoj, aŭ flatadoj aŭ falsaĵoj. **2.** Ho mildaj zorgoj de kiuj nin amas, beataj servoj de maltimuloj, ho fido pura de tiuj kiuj timas nur Dion, ho vereco de vortoj ĉe tiuj kiuj ne povas trompi, ho belo de faroj ĉe tiuj kiuj persvadiĝis servi Dion, perpreĝe konvinki Dion, plezurigi Dion; ili ne opinias alproksimiĝi al via karno, sed ĉiuj alproksimiĝas al via animo¹⁷³, ili ne intencas paroli kun frato sed kun la reĝo de ĉiuj jarcentoj kiu loĝas en vi.

36,1. Ĉiuj kredantoj estas bonaj kaj proksimaj al Dio, kaj ili estas indaj je la nomiĝo kiu ilin kronas kiel diademo. Kaj tamen ekzistas iuj kiuj estas eĉ pli elektitaj inter la elektitoj¹⁷⁴, kaj pli aŭ malpli videblaj: kelkmaniere ili fortreniĝas el la monda ŝtormo kaj ili sin metas en sekura loko, pro la volo

¹⁷³ Evidente unuatempa kristanaro kredis je la reciproka propetado.

ne ŝajni sanktuloj, kaj pro la honto kiam oni tion diras koncerne ilin. Ili kaŝas en la profundeco de iliaj pensoj la nedireblajn misterojn¹⁷⁵ kaj malpermesas ke ilia animnobleco vidigu en la ekstera mondo, mem, kiujn la Verbo nomas “lumo de la mondo” kaj “salvo de la tero¹⁷⁶”. **2.** Tiu ĉi, estas la semo¹⁷⁷, la imago kaj la bildo de Dio, kaj Lia vera filo¹⁷⁸ kaj heredanto¹⁷⁹, ĉi tien sendita kvazaŭ por restado en fremda lando danke al grandaj intimeco kaj familiareco kun la Patro; **3.** Pere de Li¹⁸⁰ estis konstruitaj kaj la videblaĵoj kaj la nevideblaĵoj en la mondo, iuj por ke ili estu je Lia servo, aliaj por Lia mastrumado, eĉ aliaj por ke Li povu konstati, kaj ĉiuj estas unuigitaj ĝis la semo restos ĉi tie, kaj kiam tiu estos rikoltita ili tuj estos detruitaj.

¹⁷⁴ Klemento montras ankaŭ tie ĉi ke mem havas “estetikan” (= ĉi-kaze preskaŭ sensa percepto pri la valoro de la proksimeco al io celata). La kredanto, fakte, pro la fakto mem de sia kredago, fariĝas “bona kaj proksima” al Dio. La mara metaforo, en kiu la elektitoj treniĝas for de la monda ŝtormo estas je epikureca origino.

¹⁷⁵ Vidu 1Pr 1,8.

¹⁷⁶ Mt 5,14.10.

¹⁷⁷ La terminologio de la “semo” indikanta la elektitojn kaj “restadon en fremda tero”, kaj plueluzita por desegni la surteran vivon en la putriva loĝejo de la korpo, devenas el la gnostika literaturo.

¹⁷⁸ Tt 1,4.

¹⁷⁹ Rm 8,17. Heredanto estas la kristanaro, nome la semo. La karakterizo de la Verbo priskribas la semon kaj la semo priskribas la Verbon!

¹⁸⁰ Oni notu kiel la semo, nome la kristanaro, fariĝas kaj funkcie identiĝas kun la Verbo Peranto.

37,1. Kio necesas diri plue? Rigardu la misterojn de la amo kaj tiam vi povos kontempli la sinon¹⁸¹ de la Patro kiun nur la solenaskita Filo de Dio revelaciis¹⁸². **2.** Kaj Dio mem estas amo¹⁸³ kaj pere de la amo li estis de ni kaptita¹⁸⁴. Kaj dum la nedirebla realo de Li estas Patro, Lia kompato al ni fariĝis patrino. La Patro, aminte, fariĝis virina¹⁸⁵, kaj la granda signo pri tiu okazaĵo estas Tiu Kiun li naskis el Si mem; kaj la frukto kiu naskiĝis el la amo estas la amo mem. **3.** Tial mem venis persone, tial Li propravole sin vestis per la humaneco kaj suferis la homajn dolorojn, ĉar elprovinte la malfortecon de ni kiujn Li amis, li povus interŝanĝe elprovi nin pere de Sia povo. **4.** Kaj kiam li estis jam sinoferanta kvazaŭ¹⁸⁶ kaj donanta Sin mem kiel elaceton, Li nin lasis novan aliancigan ordonon: “Novan ordonon mi donas al vi, ke vi amu unu alian; kiel mi amis vin, tiel vi ankaŭ amu unu alian¹⁸⁷”. Kaj kio estas tiu amo kaj kiom granda ĝi estas? Por ĉiu el ni Li donis Sian vivon kiu valoras ĉion: interŝanĝe Li petas de ni tiun saman vivon unuj por la aliaj¹⁸⁸. **5.** Se ni ŝuldas nian vivon al niaj gefratoj kaj interŝanĝe ni priĵuris tiun interligon al la Savanto, ĉu ni ankoraŭ gardos la mondum-

¹⁸¹ Komentistoj rimarkigas ke jam la termino “sino” (en la greka κὸλποј = brusto laktoplena) rilate la Patron aldonas “virinecan” karakterizon al Dio. Eble temus pri oksomoro karakteriza de la mistikula lingvaĵo aŭ provo vidi en Dio patrinecajn aspektojn jam aluditajn en la profetoj.

¹⁸² Joh 1,18.

¹⁸³ 1Joh 4,8.16.

¹⁸⁴ Aliaj tradukas “estis de ni kontemplata”. La interpreto pli transdonita devenas de la supozita verba formo eger£qh jam uzita de la gnostikuloj.

¹⁸⁵ Revenas la koncepto de la patrineco de Dio.

¹⁸⁶ 2Tm 4,6.

¹⁸⁷ Joh 13,34; 14,27.

¹⁸⁸ Joh 15,13.

aĵojn, kiuj estas malriĉaj, eksteraj kaj efemeraj, kvazaŭ temus pri trezoro? Ĉu ni reciproke rezignos pri tiaĵoj kiujn antaŭ ne multe da tempo la fajro sin alproprigos? Mirinde kaj inspire Sankta Johano diras:” Ĉiu, kiu malamas sian fraton, estas hommortiganto¹⁸⁹”, li estas semo de Kaino, filo de la diablo, li ne havas esperon pri pli grandaj realaĵoj, li estas malfekunda homo, sen gefiloj, li ne estas vitobranĉo¹⁹⁰ de la ĉiela vinberarbo kiu ĉiam vivos, li estas fortranĉita, li atendas la senĉesan fajron.

38,1. Vi, kontraŭe, lernu la pli preferindan vojon¹⁹¹ kiun Paŭlo montras por la savo: “La amo ne celas por si mem”, sed ĝi elverŝiĝas sur la fraton; por li ĝi plenas je miro, koncerne lin ĝi saĝe freneziĝas¹⁹². **2.** “La amo¹⁹³ kovras amason da¹⁹⁴ pekoj perfekta amo elĵetas timon amo ne fanfaronas, ne ŝveligas sin, ne ĝojas pri maljusteco, sed kunĝojas pro la vero; ĉion toleras, ĉion kredas, ĉion esperas, ĉion eltenas. Amo neniam pereas, profetadoj neniĝos, lingvoj ĉesiĝos, medikamentoj restos sur la teron. Restas do nun fido, espero, amo, tiuj tri; kaj la plej granda el ili estas amo¹⁹⁵”. **3.** Kaj prave: fakte la fido foriras kiam vidinte Dion per niaj propraj okuloj ni konvinkiĝos per nia rigardo, kaj la espero malaperas kiam okazas

¹⁸⁹ 1Joh 3,15.

¹⁹⁰ Vidu Joh 15,5s.

¹⁹¹ 1Kor 12,31.

¹⁹² 1Kor 13,5. Klemento ekcitas la Paŭlan kantiko al amo.

¹⁹³ passo special

¹⁹⁴ 1Pt 4,8.

¹⁹⁵ 1Joh 4, 18.

la esperaĵoj, la amo, male, plenumiĝas¹⁹⁶ kaj kreskas ĉiam pli kiam estos donacita kio estas perfekta¹⁹⁷.

La pentofaro

4. Kaj se iu akceptas la amon en sia animo, eĉ se li naskiĝis en la pekoj¹⁹⁸ kaj faris multe da malpermesitaĵoj, tiu, kreskiginte en si la amon kaj iniciatinte puran konvertiĝon, povas venki la malbonaĵojn en kiujn mem enfalis. **5.** Sed se vi observas riĉulon kiu, kvankam ne havante loĝejon en la ĉielo,

39,1. kaj iel ajn uzante kion li havas, li evitis la sorĉon de la riĉeco kaj ĝian danĝeron por la vivo kaj atingis la eternajn bonojn; kaj se poste okazas ke, pro nesciado, aŭ pro febleco, aŭ pro senvola okazaĵo, post la ricevo de la sigelo¹⁹⁹ kaj de la elaĉeto, mem eventuale renkontis erarojn aŭ pekojn, tiom ke li estas tute subpremata de ili kaj tute kondamnita de Dio²⁰⁰, tiu ne estu por vi motivo por povi vin senti kaptita de malespero kaj de malprudenteco. **2.** Fakte al tiu kiu turnis sin al Dio per veremo tutkora, malfermiĝas ĉiuj pordoj kaj la Patro²⁰¹ tre ĝoje akceptas la filon sincere konvertiĝantan; la vera konvertiĝo estas ne plu sin submeti al tiaĵoj, sed esti tute elradikiĝinta el la animo la pekojn pro kiuj oni kondamnis sin al la morto; fakte, kiam tiuj ĉi pekoj

¹⁹⁶ 1Kor 13,4.6-8.13.

¹⁹⁷ La novtestamenta esprimo plĈrwma estas uzata de Klemento same kiel de gnostikuloj por indiki la lokon de la plenumiĝo de la promesoj.

¹⁹⁸ Joh 9,34.

¹⁹⁹ “Sigelo” estas la bapto (vidu Rm 4,11; 2Kor 1,22).

²⁰⁰ Str.II 57,1.

²⁰¹ Vidu Lk 15,23s.

estos forpuŝitaj, Dio denove venos loĝi en vi. **3.** Jesuo diras, ke granda kaj senegala estas la ĝojo kaj la festo por la Patro en la ĉielo kaj por la anĝeloj kiam ununura pekulo sin turnas al Li kaj konvertiĝas²⁰². Tial Li ankaŭ diris forte: **4.** “Mi deziras bonfaradon, sed ne oferon; mi ne volas la morton de pekulo, sed lian konvertiĝon; kaj se viaj pekoj estus eĉ kiel skarлата lano mi ilin blankigus kiel neĝon, kaj se ili estus plej nigraj ol mallumo, mi ilin lavus kaj ilin blankigos kiel blankan lanon²⁰³”. **5.** Fakte nur Dio povas doni la pardonon de la pekoj kaj ne kalkuli la falojn²⁰⁴, ĉar ankaŭ al ni la Sinjoro ordonas pardoni ĉiutage la gefratojn kiuj pentas²⁰⁵. **6.** Kaj se ni, kiuj estas malbonuloj, tamen scias doni bonajn donacojn, kiom pli “La Patro de la kompatoj²⁰⁶, la bona Patro“ de ĉiuj konsoloj²⁰⁷”, plena je tenerecoj kaj kompatato, estas grandanima? Li atendas tiujn kiuj konvertiĝis: konvertiĝi signifas vere ĉesi pekadi kaj ne plu rigardi malantaŭ si²⁰⁸.

40,1. Rilate la eraropjn plenumitajn de ni en la estinteco Dio nin pardonas, rilate la postvenantajn ĉiu pardonon akiras per si mem.²⁰⁹. Ankaŭ tio signifas sin penti, tio estas agnoski la

²⁰² Vidu Lk 15,7,10.

²⁰³ Ankaŭ ĉi-rilate Klemento inspiriĝas el diversaj bibliaj eroj.

²⁰⁴ Mk 2,7; Lk 5,21; 2Kor,5,19.

²⁰⁵ Lk 17,3s.

²⁰⁶ Mt 7,11:Lk 11,13.

²⁰⁷ 2Kor 1,3.

²⁰⁸ Vidu Lk 9,62.

²⁰⁹ Kroma referenco al la gnozo. La diskuto temas pri la pekoj plenumitaj post la nuligo de la pekoj plenumitaj antaŭ la bapto. Klemento prezentas sian personan respondon al la problemo. La esprimo trovas konkretan ekzemplon en la historio, rakontata tuj poste, pri la juna malbonfaranto. La

pasintajn erarojn kaj peti de la Patro ne plu rememori ilin. Li sola kapablas igi nefaritaj la erarojn jam faritajn forviŝinte la faritajn pekojn per la kompato kiu venas de Li kaj per la roso de la Sankta Spirito. **2.** Fakte li diras: “ĉiun el vi Mi juĝas konforme al lia konduto²¹⁰”, kaj por ĉiu afero li krias ke la fino de ĉio alproksimiĝas²¹¹. **3.** Tial eĉ por kiu bone faris dum sia tuta vivo la plej grandajn agojn, sed je la fino grundas sur la malbono, por tiu estas senutilaj la pasintaj streĉoj²¹², ĉar li estos eksterkonkursa je la fino²¹³ de la dramo; kontraŭe por tiu kiu en la pasinteco vivis pli malbone (ol antaŭ la bapto) kaj malzorge eblas, poste, sin konvertiĝinte, venki sian propran malbonan konduton, kiu daŭris dum longa tempo, per la tempo kiu sekvas la konvertiĝon²¹⁴; **4.** Tamen necesas granda zorgo, kiel al la malforta korpo post longa malsano necesas dieto kaj pli granda terapio. **5.** Ho ŝtelinto, ĉu vi deziras havi la pardonon? Ne plu ŝtelu²¹⁵. Kiu adultis, tiu ne sin lasu bruladi de la pasio²¹⁶; kiu malĉastis, tiu estontece estu pura; kiu ŝte-

rigora emo encerbigis ke por la pekoj postbaptaj plenumitaj ne povas esti kompato en la Eklezio; Klemento evidente emas pensi kaj pensigis ke la bapto ne evitigas aŭtomate pekajn falojn, tial la Eklezio, kaj ĉe Dio, oni praktiku la pardonon al la pentantoj. En la ekzemplo, la episkopo ludas la rigoran emon, kiu ĉikaze neglektas la junulon en lia peko-stato.

²¹⁰ Eze 33,20. La esprimo estas atribuita, erare, ne al la profeto Ezekielo, sed al Kristo.

²¹¹ Vidu 1Pt 4,7.

²¹² Sĝ 3,11.

²¹³ La greka vrto katastrof” desegnas ĉu decidan ŝanĝon ĉu la finon de la dramo. Ĉi tie estas preskribita la sorto de la pekulo laŭ la rigora emo.

²¹⁴ Vidu Eze 18,21-29.

²¹⁵ Ef 4,28.

lis, tiu redonu kaj li redonu abundege²¹⁷; kiu parolis malveran ateston, tiu ekzercu sin paroli la veron; kiu estas ĵurrompanto, tiu ne plu faru falsan ĵuron. Fortranĉu de vi ankaŭ la aliajn pasiojn²¹⁸, la kolerigemon, la deziron, la doloron, la timon, ĉar ĉe la elviviĝo vi povu vin trovi fronte de la malamiko estante jam liberigita sur tiu tero²¹⁹. **6.** Do, verŝajne estas neeble forigi komplete la pasiojn kiuj kreskis kune kun vi, sed per la povo de Dio, kaj per la homa preĝo de la gefratoj, per vera konvertiĝo kaj per daŭra ekzercado ili povas esti korektitaj.

41,1. Tial absolute necesas ke vi, kiu estas aroganta, potenca kaj riĉa, oku kiel vian gvidanton apud vi homon de Dio kvazaŭ trejniston kaj ŝipestron. Respektu lin ankaŭ se li estas unuopulo, timu lin ankaŭ se li estas sola, prizorgu lin aŭskulti eĉ se li estas la nura sincera parolanto kaj eĉ se li samtempe vin riproĉas malmilde kaj vin prizorgas. **2.** Fakte eĉ ne al la okuloj konvenas resti ĉiam sen korektoj, sed konvenas plori kaj kelkfoje sin lasi piki por akiri pli grandan sanon. **3.** Same ankaŭ por la animo nenio estas pli pereiga ol senĉesa plezuro: ĝi fakte blindiĝas pro elĉerpiĝo se ĝi restas senmova antaŭ vorto sincere dirita. **4.** Kaj timu tiun homon kiam li ekkoleras, ĉagreniĝu kiam li malĝojiĝas, respektu lin kiam li malkoleriĝas, antaŭavertu lin kiam li evitas punkorekton. **5.** Kaj tiu ĉi

²¹⁶ Vidu 1Kor 7,9. Rilate ĉaston ene kaj ekstere de edziĝo oni sciis ke Klemento estimas kaj sekvas la doktrinojn, severajn, de stoikistoj kaj pitagoranoj, ekzemple de Musonio kaj Sesto, laŭ kiuj seksa rilato celu nur generadon (neplezuron) eĉ en geedziĝo.

²¹⁷ Vidu Lk 19,8.

²¹⁸ Por kontroli la stoikan difinon de la pasioj oni konsultu Pedagogon.

²¹⁹ Vidu Mt 5,25; Lk 12,58.

homo viglu por vi dum multaj noktoj²²⁰ iĝinte kvazaŭ ambasadoro por vi ĉe Dio kaj ravante la Patron per senĉesaj litanioj. Li, fakte, nekontraŭas Siajn gefilojn kiuj vokas Sian teneron.²²¹ **6.** La homo de Dio de vi honorita preĝos per pura koro, kiel anĝelo de Dio kaj neniel ĉagrenita de vi, sed por vi. Tiu estas sincera konvertiĝo. **7.** “Dio ne povas esti mokata²²²” kaj ne prientas la malplenajn vortojn: fakte nur Li traesploras internajojn, lumojn kaj korojn²²³ Li aŭskultadas tiujn kiuj baraktas tra la fajro kaj elaŭdas tiujn kiuj kuŝas en la ventro de la baleno kaj Li estas proksima al ĉiuj kiuj kredas je Li kaj Li restas for de la sendiuloj, krom se ili konvertiĝas.

La rakonto pri la juna rabisto²²⁴

42,1. Tial ke vi, kiu vere konvertiĝis, povu fidi je la fakto ke restas al vi sufiĉa espero pri via savo, aŭskultu rakonton kiu ne estas ĝustadire rakonto sed vera historiaĵo²²⁵ transrakontita kaj konservita en la memoraĵoj pri la apostolo Johano. **2.** Post kiam mortis la tirano²²⁶ li direktiĝis el insulo nomata

²²⁰ Hebr 13,17.

²²¹ Laŭlitere “visceroj”.

²²² Gal 6,7.

²²³ Hebr 4,12; Jer 17,10; Ps 7,10; Ap 2,23.

²²⁴ Oni rakontas ĉi tie pri juna rabisto kondukita al la eklezia sino verke de Johano. La verkero eble povas bildiĝi, pro ĝiaj karakterizoj kaj pro la ekzempla celo, homilia tono, komunikante, per historia travivaĵo, ke Dio estas ĉiam preta pardoni.

²²⁵ Pluan fojon Klemento ekuzas klasikan figuron, nome la kontrasto inter *mythos kaj logos* (mito kaj logoso), inter fabelo, la rakonto transdonita perbuŝe, kaj la vorto certa, racia, transdonita perskribe, kiel plurfoje eksplicite dirate de Platono.

²²⁶ Estas la imperiestro Domiciano, mortinta en jaro 96a.

Patmos²²⁷ al Efezo, kaj li iradis porti konsolon ankaŭ en la teritorioj proksimaj al paganoj, tie por nomumi episkopojn, tie por akordiĝi tutaj eklezioj, tie por ricevi unu nuran el la heredaĵoj indikitaj de la Sankta Spirito. **3.** Do, alveninte al iu el la ne malproksimaj urboj, pri kiu kelkiuj diras eĉ la nomon²²⁸, post kiam li estis konsolinta la gefratojn, li rigardis la episkopon²²⁹ kiu regis super ĉiujn, kaj vidinte junulon kiu estis kun sana kaj fortika konstitucio, belaspekta kaj sindediĉa, li diris: “Tiun ĉi ulon mi konfidas al vi por gardo per ĉiu zorgo fronte al la Eklezio kaj al Kristo atestanto”. Tiu ĉi akceptis la taskon kaj faris siajn promesojn kaj Johano ripetis la samajn vortojn kaj vokis atestantojn. **4.** Poste li revenis al Efezo, kaj la sacerdote gastiginte en sia domo la junulon kiun oni konfidis al li, tiun li nutris, kaj tenis kune kun si, li lin superŝutis per amemo, kaj fine lin lumigis²³⁰. Kaj post tio li malintensigis la zorgon kaj la gardon, pretekste ke li jam flankemetis al li la perfektan gardiston, la sigelon de la Sinjoro. **5.** Sed al la junulo, kiu estis akirinta la sendependecon antaŭ la ĝusta momento, alproksimiĝis por lin ruinigi iuj samaĝuloj kiuj estis mallaboremaj kaj kutimiĝintaj al ĉia malvirto kaj al malbonfaro; kaj ili unue lin implikis en luksajn diboĉfestenojn, poste foririnte dumnokte por ŝteladoj ili kunportis lin kune kun si, fine ili opiniis fareblan kune kun li pli gravan krimon. **6.** Kaj ĉi tiu ulo iom post iom alkuti-

²²⁷ Pro la ĉeesto de Johano en Patmos. Ap 1,9.

²²⁸ Eble Smirno, Olimpiko 202^a, jaro 101.

²²⁹ Se la urbo estas Smirno, la episkopo al kiu Johano konfidas la junuleton povus esti kelkiu el la posteuloj de Polikarpo: Polikarpo fakte eble episkopis en Smirno dum la martiro de sankta Ignaco, nome ĉirkaŭ 110a.

²³⁰ Aŭ lin baptis. La metaforo de la luminiĝo per la bapto aperas kune kun kromaj metaforoj (kiel medikamento, filtrilo) en Klemento, ekzemple en Protr. 89,3; Ped. II 86,2.

miĝadis kaj pro sia fortika naturo, kiel ĉevalo sen mordaĵo kaj sen brido, kiu perdas la ĝustan vojon, mordinte la bridon²³¹ li forte treniĝadis en la abismon. **7.** Kaj tute perdinte la esperon rilate al la savo en Dio, li ne plu pensis pri etaj krimoj, sed farinte jam gravan krimon, ĉar li estis definitive perdita li opiniis ĝusta afero suferi la saman sorton de la aliuloj. Kaj preninte kune kun si tiujn samajn kamaradojn kaj kuniginte bandon da rabistoj, li estis preta kiel bandestro, violentegulo, sangavidulo, kruelulo. **8.** La tempo pasis kaj prezentiĝinte iu neceso, oni revokis Johanon. Kaj tiu ĉi post kiam li estis finaranginta la aferojn pro kiuj li estis vokita, li diris: "Nu, ho episkopo, redonu al mi kion vi ricevis depone de mi kaj de Kristo fronte al la atestanta Eklezio kiun vi estras". **9.** La episkopo unuamomente restis konsternita, pripensante esti kalumniita pro mono kiun li neniam ricevis; kaj li ne povis konsenti krediton por aferoj kiujn li ne havis; nek li povis ne kredi je Johano. Sed kiam Johano diris: " Mi postulas de vi returne la junulon kaj la animon de la frato", tiu ĉi, sopirĝeminte profunde el la koro kaj plorinte, diris: "Li mortis". Kiel? Kaj per kia morto?". "Li mortis je la okuloj de Dio²³² ; fakte li fariĝis malica kaj malvirta, kaj, ĉefe, li fariĝis rabisto kaj nun anstataŭ la Eklezio li makizis tramonte kune kun kanajlaro simila al li". **10.** La apostolo forŝirinte siajn vestojn kaj frapinte sian kapon, post granda ĝemado diris: "Belan gardiston por la animo de la frato mi lasis. Sed, nu, oni alportu al mi ĉevalon kaj iu gvidu min laŭvoje". Kaj li foriris el la preĝejo tia kia li estis. **11.** Alveninta al la loko li estis kaptita de la rabistaj gardostarantoj, sen forfuĝi nek humile peti, sed

²³¹ La figuro de la ĉevalo ribela al mordaĵo origine estas platona, kaj prezentiĝas ankaŭ aliverke en Klemento.

²³² Vidu en Origeno Kontra Cels. III, 51 kaj En Ped. III, 1.

kriante: “Mi venis intence, akompanu min ĉe vian estron”.
12. Kaj, intertempe, tiu ĉi, tiel armita, atendadis: sed kiam li rekonis Johanon kiu venis ĉe lin, li hontis kaj ekforkuris. Kaj tiu lin sekvadis preter siaj fortoj, forgesinte sian aĝon kaj kriante: **13.** “Kial, ho filo, vi forfuĝas de mi kiu estas via sen-arma, maljuna patro? Kompatu min, ho filo, ne timu: vi ankoraŭ havas esperojn je vivo. Mi respondecos pri vi antaŭ Kristo²³³; se vi tion petas de mi mi volonte suferos vian morton kiel Jesuo faris por ni. Por vi mi donos interŝange mian animon. Bonvolu halti, kredu min: Kristo min sendis”. **14.** Kaj tiu ĉi, unuamomente, aŭdinte tion haltis terenrigardante, poste li forĵetis la armilojn, kaj ekstremante li maldolĉe ploris²³⁴, brakumis la maljunulon kiu iris al li renkonten, konfesante per ĝemadoj okaze povaj kaj sin baptigante la duan fojon pere de la larmoj, kaj kaŝante nur la dekstran manon. **15.** Kaj Johano, garantiante kaj ĵurante al li ke li mem estis trovinta la pardonon por li antaŭ la Sinjoro, preĝante kaj ĝenuiĝante, kaj kisantante tiun saman dekstran manon kiel se ĝi estus purigita de la pento, lin rekondukis al la eklezio, kaj petpreĝante per multegaj preĝoj, luktante per daŭraj fastoj, per allogaj²³⁵ variaj paroladoj interesigante lian menson li foriris, kiel oni diras, ne antaŭ ol elektigis lin kiel estron de la eklezio mem²³⁶, tiel doninte grandan ekzemplon de vera pento kaj grandan signon

²³³ Vidu Hebr 13,17.

²³⁴ Vidu Mt 26, 75; Lk 22,62 (temas pri la amara ploro de Petro kiam konsciiĝas ke mem perfidis Jesuon).

²³⁵ En la teksto estas dirate litere “kun sirenoj”; ĉi tie oni eksplicite aludas la homeran miton pri la sirenoj rakontitan en Odiseado. Ĝenerale la sirenoj estis eluzitaj, en la mito, por desegni la delogojn de la vorto.

²³⁶ La fakto ke la junulo estas levita al ĉefo en la Eklezio montras la renversiĝo de la sorto, frukto de la konvertiĝo.

de renaskiĝo, trofeon de videbla resurekto²³⁷. **16.** [...] ²³⁸. Kun brilegaj vizaĝoj, ĝojante, kantante himnojn, malfermante la ĉielon. Antaŭ ĉiuj la Savanto mem antaŭeniras prezentante la dekstran flankon, proponante senombran, senfinan lumon, indikante la vojon al la sino de la Patro, al la eterna vivo, al la ĉiela regno. **17.** Oni kreu je tiuj samaj aferoj, kaj je la disĉiploj de Dio kaj je Dio atestanta, per profetaĵoj, per la Evangelio kaj per la vortoj de la apostoloj, vivante kune kun ili kaj ilin aŭskultante kaj praktikante iliajn farojn, oni kiam li elviviĝos li vidos la efektiviĝon de sia kredo. **18.** Fakte kiu akceptis dum sia surtera vivo la anĝelon de la konvertiĝo tiu ne konvertiĝos kiam li forlasos sian korpon, nek hontos vidante la Savanton kiu antaŭeniras kun Sia gloro kaj Sia armeo; li ne timos la fajron. Kaj se, kontraŭe, iu elektas resti en la pekoj pro la ĝuoj kaj li preferas feliĉan vivon surtere kaj, se la Savanto donas al li la pardonon, li sin turnas aliflanken, tiu encerbiĝu povi kulpigi nek Dion nek la riĉaĵojn, nek la fakton ke li eraris en la pasinteco, sed li kulpigu pro tio sian animon kiu memvole perdiĝis. **19.** Al tiu kiu sin turnas por rigardi la savon kaj ĝin deziras kaj insiste kaj forte ĝin petegas²³⁹. Li donas la veran puriĝon kaj la neŝanĝeblan vivon de la bona Patro kiu estas en la ĉielo. **20.** Al Li pere de la Filo Jesuo Kristo, Sinjoro de la vivantoj kaj de la mortin-

²³⁷ La solvo de Klemento rilate la pekojn plenumitajn postbapte estas tial jena: la savo estas ĉiukaze ĉiam ebla.

²³⁸ La teksto ci tie prezentas grandan malplenaĵon kiun diversaj kritikistoj provas plemuni diversmaniere. Eble temas pri listo de malvirtoj drame punotaj okaze de la fina dia juĝo.

²³⁹ Vidu Lk 11,8: Mt 11,12.

toj²⁴⁰, pere de la Sankta Spirito, estu gloro, honoro, forto, eterna grandeco nun kaj por ĉiam kaj eterne²⁴¹. Amen.

²⁴⁰ Vidu Rm 14,9.

²⁴¹ Vidu Rm 16,27;Ef 3,21; 1Tm 1,17; 1Klem al la Korintanoj 61,3; 65,2.